

# Strategia Laborplano de UEA 2013-2017

*Versio aprobita de la Komitato de UEA*

Rejkjaviko, la 26an de julio, 2013

*La Strategia Laborplano estas kolektiva verko de  
la Komisiono pri Strategiaj Demandoj, konsistanta el  
dek homoj elektitaj de la Komitato de UEA en Havano en 2010:*

*Peter Baláž • Osmo Buller*

*Renato Corsetti • Loes Demmendaal*

*Mark Fettes (kunordiganto) • Stefan MacGill*

*Michael Boris Mandirola • Sonja Petrović-Lundberg*

*Ileana Schrøder • José Antonio Vergara.*

# Enhavo

Enkonduko .....	1
0. Ĝeneralaj rimarkoj.....	1
Agadkampo 1: Konsciigo .....	2
1.1. Ĝeneralaj celoj .....	2
1.2. Rolo de UEA .....	2
1.3. Organizaj rimedoj.....	3
1.4. Strategiaj prioritatoj sur Agadkampo 1 .....	3
1.5. Tempoplanado laŭ jaroj.....	4
1.6. Strategia laborplano de TIR.....	5
1.7. Strategia laborplano de KER.....	6
1.8. Strategia laborplano de CED.....	7
Agadkampo 2: Kapabligo.....	8
2.1. Ĝeneralaj celoj .....	8
2.2. Rolo de UEA .....	8
2.3. Organizaj rimedoj.....	9
2.4. Strategiaj prioritatoj sur Agadkampo 2 .....	10
2.5. Tempoplanado laŭ jaroj.....	11
2.6. Strategia laborplano de UEA kunlabore kun ILEI .....	12
2.7. Strategia laborplano de UEA kunlabore kun Lernu.net.....	13
2.8. Strategia laborplano de UEA kunlabore kun Edukado.net.....	14
2.9. Strategia laborplano de TEC .....	15
2.10. Strategia laborplano de la Fondaĵo por Klerigo kaj Kapabligo .....	16
Agadkampo 3: Komunumo .....	18
3.1. Ĝeneralaj celoj .....	18
3.2. Rolo de UEA .....	18
3.3. Organizaj rimedoj.....	19
3.4. Strategiaj prioritatoj sur Agadkampo 3 .....	20
3.5. Tempoplanado laŭ jaroj.....	20
3.6. Strategia laborplano de la Centro por Kultura Evoluigo (CKE).....	21
3.7. Strategiaj laborplanoj de la regionaj komisionoj .....	23
Agadkampo 4: Kunordigo.....	25
4.1. Kunordiga rolo de UEA.....	25
4.2. Organizaj rimedoj.....	25
4.3. Strategiaj prioritatoj sur Agadkampo 4 .....	26
4.4. Organiza evoluigo.....	27
4.5. Landa kaj regiona evoluigo .....	29
4.6. Financa evoluigo.....	30
4.7. Tempoplanado laŭ jaroj.....	32
Apendico: Strategiaj Prioritatoj de UEA, 2013-17 .....	33

# Enkonduko

## 0. Ĝeneralaj rimarkoj

0.1. *Strategia Bazo.* Ĉi tiu skizo de la strategio de UEA por la kvar jaroj 2013-17 estas bazita sur pli frua dokumento, la Strategia Bazo de UEA, kiu aperis en la revuo *Esperanto* en oktobro kaj novembro, 2012. Oni trovas tie la ĝeneralan pensokadron, kiu gvidis la verkadon de la Strategia Plano.

0.2. *Ĉefaj agadkampoj.* La Strategia Bazo analizas la agadon de UEA laŭ kvar ĉefaj agadkampoj: Konsciigo, Kapabligo, Komunumo, kaj Kunordigo. La nuna dokumento plidetiligas la strategion sur tiuj kampoj. En pluraj lokoj, nomoj kaj aliaj detaloj ŝanĝiĝis en komparo kun la pli frua teksto, sed la baza direkto de la strategio restas senŝanĝa.

0.3. *Tempodaŭro.* Tiu ĉi plano celas gvidi la laboron de la Estraro, la Komitato, kaj ĉiuj UEA-aktivuloj je diversaj niveloj de la Asocia strukturo, dum la trijara periodo en kiu oficos la Estraro elektita en Rejkjaviko. Tamen, la plano ampleksas ankaŭ kvaran jaron, ĉar multon oni komencas pretigi jam en la antaŭa jaro. Supozeble, nova Strategia Plano estos prezentita al la Komitato en la kongreso de 2016, kiam preparoj por la jaro 2016-17 estos jam progresintaj; ĝi do ne povas manki ĉi tie. Jaroj kalkuliĝas de aŭgusto ĝis julio (la dek du monatoj inter la kongresoj).

0.4. *Utiligo de la Plano.* Malgraŭ sia amplekso, ĉi tiu Plano ankoraŭ malhavas multajn detalojn, kiuj necesos por ĝia efektivigo. Tiujn detalojn necesos ellabori en konkretaj kunteksto. Tial oni ne rigardu la planon unuavice kiel liston de farendaĵoj, sed prefere kiel mapon, kiu montras la interrilatojn inter la multaj diversaj facetoj de la Esperantomovado kaj la specifaj strukturoj kaj agadoj de UEA. Ĝi celas doni pli tutecan kaj koheran bildon pri tio, kio nun estas kaj kia devus esti UEA. Surbaze de tiu bildo, eblas fari pli saĝajn decidojn pri la bezonoj kaj rimedoj sur la diversaj agadkampoj. La esencon de la Plano resumas la 12 strategiaj prioritatoj, kiujn oni difinas por tiuj agadkampoj. Ili estas kunigitaj en la fino de la dokumento kiel apendico.

0.5 *Kultivi celkonscion.* Tiu ĉi estas la unua provo ellabori tiel kompletan strategion por UEA. Kiel pionira dokumento, ĝi sendube enhavas diversajn mankojn. Ĝi ankaŭ povas impresi tro ambicie por la limigitaj rimedoj de la Asocio kaj la movado ĝenerale. Tamen, eĉ se ne ĉion oni sukcesos realigi laŭ la ideoj prezentitaj ĉi tie, pri la neceso de nova direkto apenaŭ povas esti dubo. Se tiu ĉi Plano stimulos pensadon, diskutadon kaj pli celkonscian kunlaboron sur ĉiuj niveloj de la UEA-strukturo, ĝi jam plenumos gravan rolon.

# Agadkampo 1: Konsciigo

## 1.1. Ĝeneralaj celoj

1.1.1. *Baza informado.* Atingi, ke ĉiu homo kun baza klereco (ekz. ĝis la 7a klaso en lernejo) sciu kernajn faktojn pri Esperanto kaj havu aliron al pli detalaj kaj aktualaj informoj en sia(j) lingvo(j) de kleriĝo.

1.1.2. *Simpatiantoj.* Kreskigi informitan tutmondan publikon (prioritate inter opini-kreantoj kiel ĵurnalistoj, verkistoj, intelektuloj, politikistoj kaj simile), kaj kultivi ties pretecon aktive kaj konkrete subteni Esperanton per diversaj agoj kaj en diversaj kunteksto.

1.1.3. *Kunagantoj.* Ĉe aliaj sociaj movadoj kaj organizoj tutmonde, varbi aliancantojn kiuj vidas en Esperanto rimedon por socia/kultura evoluigo kiu kongruas kun iliaj propraj celoj kaj valoroj.

1.1.4. *Aktivuloj.* Ĉe la esperantista publiko, altigi ĉie la ĝeneralan klerecon pri informado (metode kaj enhance), kaj strebi al sinergia efiko de ĉiuj informaj agadoj, tiel kreante pli pozitivan kaj koheran bildon pri la movado.

1.1.5. *Edukado al tutmonda konscio.* Ĉe ĉiuj publikoj, inkluzive de tiuj kiuj parolas Esperanton, kreskigi konscion kaj komprenon pri tutmondaj temoj, interalie pri la ligoj inter lingva kaj kultura diverseco kaj paco, justeco, kaj daŭripova evoluo.

## 1.2. Rolo de UEA

1.2.1. *Disponigo de informoj.* Havebligi ĝisdatajn kaj fidindajn informojn kaj informilojn en kiel eble plej multaj lingvoj, adapteblajn al lokaj cirkonstancoj, uzante ĉiujn gravajn teknikajn rimedojn de la nuntempo.

1.2.2. *Reprezentado en internaciaj forumoj.* Informi, argumenti, kaj kunlabori sur internacia/tutmonda nivelo kun neregistaraj kaj interregistaraj organizoj, interalie Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko.

1.2.3. *Esploro kaj dokumentado.* Ellabori kaj disvastigi novajn sciojn kaj analizojn pri la lingva dimensio de mondaj problemoj kaj pri la rolo (historia, nuna, estonta) de Esperanto en tiaj kunteksto.

1.2.4. *Aktivula trejnado.* Plialtigi la nivelon de sinprezentado, argumentado kaj kunrilatado ĉe diversaj celpublikoj, profitante de profesiaj metodoj kaj strategioj sur la kampoj de informado, merkatico kaj lobiado.

1.2.5. *Kunordigo.* Faciligi ĉi-kampan kunlaboron inter aktivuloj ĉiulande, kun aparta atento al la plifortigo de la landaj asocioj, al tiuj fakaj asocioj kiuj ludas aktivan konsciigan rolon sur sia laborkampo, kaj al ŝlosilaj temoj (ekzemple, lingvaj rajtoj) en la rilatoj kun Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko.

### 1.3. Organizaj rimedoj (por detaloj vidu poste)

1.3.1. *Esperanto.net*. Tiu ĉi retpaĝaro de UEA iĝos ĉefa kunlaborejo pri informado en ĉiuj lingvoj de la movado, simile kiel la esperantlingva paĝaro edukado.net subtenas la laboron de instruistoj. Pri la redaktado respondecos unu el la oficistoj en la Centra Oficejo, kunlabore kun volontula Komisiono (vidu sekvan punkton).

1.3.2. *Tutmonda Inform-Reto (TIR)*. Sub la gvido de internacia estraro, ĉi tiu nova branĉo de UEA celos kunigi la ĉefajn aktivulojn pri informado ĉiulande. La TIR-estraro respondecos i.a. pri la retejo esperanto.net kaj pri la organizado de trejnprogramoj pri informado; ĝi krome celos proksime kunlabori kun la landaj asocioj, kies agado estas ŝlosile grava sur ĉi tiu kampo.

1.3.3. *Komisiono pri Eksteraj Rilatoj (KER)*. Tiu ĉi instanco, kiu antaŭe ekzistis nur neformale, kunigos ĉiujn reprezentantojn de UEA en ekstermovadaj forumoj, ekz. ĉe UN kaj Unesko. Ĝi planos la iniciatojn de UEA en tiaj medioj kaj, reciproke, organizos klerigajn aranĝojn kaj publikaĵojn pri demandoj kaj debatoj el tiuj medioj por esperantistoj.

1.3.4. *Centro de Esploro kaj Dokumentado (CED)*. Tiu ĉi instanco de UEA delonge okupiĝas pri la studo kaj prezento de Esperanto en fakaj kaj politikaj medioj. En la nuna strategio, ĝi havos ankaŭ la taskon kunlaborigi diverskampajn fakulojn kiuj parolas Esperanton aŭ simpatias al ĝi, pri kolektado kaj analizado de informoj, verkado de studoj kaj libroj, organizado de konferencoj kaj simile.

1.3.5. *Subkomitato pri Agadkampo 1*. Pri kunordigita strategio sur la tuta agadkampo respondecos almenaŭ du estraranoj, pluraj komitatanoj en la Konsilio, kaj laŭbezone ankaŭ ŝlosilaj aktivuloj el la tri ĉefaj instancoj (TIR, KER, CED), sub la nomo "Subkomitato 1: Konsciigo".

### 1.4. Strategiaj prioritatoj sur Agadkampo 1

**Strategia prioritato 1.1.** *Modernigi kaj kompletigi la publikan bildon pri Esperanto.* Atingi, ke Esperanto estu vaste komprenata kiel moderna, vivanta lingvo kun unika historio kaj dinamika kulturo. Tiucele:

- ellabori informilojn kiuj objektivaj kaj konvinke prezentas Esperanton por diversaj celpublikoj, zorgante ke la tekstoj kaj tekstaranĝoj estu facile adapteblaj al diversaj kulturaj, fakaj kaj ideaj kuntekstoj;
- ellabori kaj disvastigi komunajn normojn por la informado, kiuj konsistigas karakterizan "informstilon" de UEA kaj kiujn povas apliki la landaj kaj fakaj asocioj (kaj ankaŭ lokaj grupoj k.s.) en siaj diversaj medioj;
- ellabori klaran profilon de UEA en internaciaj medioj (interregistaraj kaj neregistaraj) kiu evidentigas la ligitecon de lingvaj kaj komunikaj demandoj al aktualaj temoj kaj difinas la kontribuon de UEA sur tiuj kampoj.

**Strategia prioritato 1.2.** *Varbi kaj prizorgi subtenantojn kaj kunagantojn.* Atingi, ke la socia valoro de Esperanto kaj UEA estu vaste rekonata, tiel ke multaj homoj kiuj ne mem uzas Esperanton, tamen morale kaj finance subtenas ĝin aŭ kunlaboras kun Esperanto-organizoj por komunaj celoj. Tiucele:

- kunlige kun la agado de TIR, KER kaj CED, krei datumbazon de simpatiantoj-neesperantistoj, la Tutmonda Amikaro de Esperanto, kaj metodojn por varbi ilin;
- ellabori sistemon (ĉefe retan) por regule sendi al tiuj homoj movadajn novaĵojn, tajlitajn laŭ iliaj intereso kaj geografia situo;
- sistemece doni al tiuj homoj eblojn konkrete esprimi sian apogon, per opinisondoj, subskrib-kolektado, donacvarbado, libroreklamado, invitoj al kursoj kaj eventoj, ktp.;
- alianciĝi kun aliaj neregistaraj organizoj pri specifaj, zorge elektitaj publikaj kampanjoj.

**Strategia prioritato 1.3.** *Varbi, interligi kaj trejni aktivulojn.* Disvolvi mondvastan reton de multaj registritaj kaj lertaj aktivuloj pri informado, eksteraj rilatoj, kaj esploro kaj dokumentado. Tiucele:

- krei unuecan registrosistemon kaj komuniksistemon ĉe esperanto.net, kaj sisteme aligi al ĝi ĉiujn aktivulojn sur la menciitaj kampoj, por interŝanĝi materialojn, informojn, spertojn kaj ideojn;
- kunlabore kun la landaj asocioj, ellabori organizan strukturon por TIR kiu faciligas komunikadon kaj kunlaboron pri informado nacikadre kaj transnacie;
- paralele, evoluigi la organizajn formojn de KER kaj CED por faciligi pli vastan partoprenon de ĉiuj interesatoj en iliaj informretoj kaj agadoj;
- starigi norman kadron por la trejnado de aktivuloj sur la menciitaj kampoj, kunlabore kun la instancoj de Agadkampo 2: Kapabligo.

## **1.5. Tempoplanado laŭ jaroj**

1.5.1. La unua jaro de ĉi tiu laborplano (2013-14) fokusiĝas al la starigo de la bezonataj organizaj rimedoj, do al la kreo de pli unueca kaj agopova asocio.

1.5.2. La dua jaro (2014-2015) elprovas tiujn rimedojn per lanĉo de la unua kunordigita monda kampanjo. Ĉar 2015 estas la cel-jaro de la Jarmilaj Evoluigaj Celoj de UN, okazos vasta tutmonda diskutado pri la evoluo de la monda socio kaj la perspektivoj por la venontaj jardekoj. Do, evidenta fokuso por la informado en tiu jaro estos la rolo de Esperanto en la evoluo de la monda socio post 2015. La preparoj por tiu kampanjo komenciĝos jam tuj post la akcepto de ĉi tiu laborplano, kaj engaĝos ĉiujn flankojn de Agadkampo 1.

1.5.3. En la tria jaro, post la fino de la kampanjo, oni pritaksos ĝian sukceson kaj tiros konkludojn por la sekvonta strategia laborplano. Samtempe disvolviĝos nova informagado ĉirkaŭ la planata lanĉo de la unua Nitobe-raporto pri lingva justeco (vidu ĉe 8.0 sube).

1.5.4. Provizore, por la kvara jaro (2016-17) oni antaŭvidu la lanĉon de dua kampanjo kunlige kun la 25a datreveno de la Rio-konferenco pri daŭropova evoluo. Same kiel la unua kampanjo prezentos Esperanton kadre de tutmondaj streboj krei pli prosperajn,

pacajn kaj sekurajn sociojn, la dua kampanjo prezentos ĝin kadre de klopodoj restarigi sanajn kaj daŭropovajn lokajn kulturojn.

## 1.6. Strategia laborplano de TIR

	2013-14	2014-15	2015-16	2016-17
SP1	Relanĉo de esperanto.net; baza informaro, informstilo	Unua inform-kampanjo: Eo kaj la monda evoluo post 2015	Informado ligita al Nitobe-raporto; fokuso al lingvopolitiko	Dua inform-kampanjo: Daŭropovo, lingva-kultura diverseco kaj Eo
SP2	Amikaro de Esperanto; informbulteno	Plivastigo de la Amikaro inter evolu-aktivuloj	Plivastigo de la Amikaro inter lingvo-aktivuloj	Plivastigo de la Amikaro inter ekologiaj aktivuloj
SP3	Starigo de aktivula reto, trejnado nivelo 1	Plivastigo de la reto; aktivigo en kampanjo	Pritaksado de progreso; planado; 2a nivelo de trejnado	Plivastigo de la reto; aktivigo en kampanjo

1.6.1. Ĉe ĉiu el la tri strategiaj prioritatoj, la TIR-estraro laboros por sisteme plivastigi la bazon de sia laboro. Post la unua jaro de reorganizo, la sekvontaj jaroj elprovos kaj evoluigos la kapablojn de niaj informaktivuloj. La fokuso de ĉiu jaro postulos novan pensmanieron kaj adaptadon de niaj tradiciaj argumentoj por pli bone respondi al la demandoj de la nuntempo.

1.6.2. La relanĉita retejo esperanto.net ludos gravan rolon en la tuta laborplano, kiel kanalo por aktualaj informoj, registrejo por aktivuloj kaj subtenantoj, kaj bazo por la komuna organiza laboro inkluzive de la kampanjoj. Ĝia evoluigo estos la ĉefa fokuso de la TIR-estraro sub strategia prioritato 1 (SP1).

1.6.3. Por plivastigi la publikon, kiun UEA povas senpere atingi kadre de sia informstrategio, TIR kreas kaj prizorgos datumbazon de simpatiantoj kaj kunagantoj en la diversaj landoj, sub la nomo Tutmonda Amikaro de Esperanto. Membroj de la Amikaro ricevos informojn nacilingve, senkoste, sed de tempo al tempo oni invitos ilin donaci por subteni la laboron de UEA. La bulteno por la Amikaro estos redaktata en Esperanto por posta tradukado en multajn lingvojn. Plivastigo de la Amikaro (SP2) estos unu el la gravaj celoj de la informkampanjoj.

1.6.4. Trejnado (SP3) ludos fundamentan rolon en la strategio. Plejparte ĝi devos okazi perrete, kun aldonaj seminarioj ĉie kie eblas. La unua nivelo de trejnado koncernos la bazajn principojn de publika informado kaj merkatico, modernajn komunikajn metodojn kaj strategiojn, kaj ŝlosilajn konceptojn en la informado pri Esperanto. La dua nivelo traktos la pli vastan socian, kulturan kaj politikan kuntekston de la informado pri Esperanto.

1.6.5. Pli detala strategia laborplano de TIR estos la tasko de ĝia unua estraro kunlabore kun Subkomitato 1: Konsciigo.

## 1.7. Strategia laborplano de KER

	2013-14	2014-15	2015-16	2016-17
SP1	Kunlaboro kun CED pri informiloj pri Eo kadre de la monda evoluo	Partopreno en konferencoj pri Jarmilaj Evoluigaj Celoj k.s.	Fokuso al lingvopolitiko en Eŭropo kaj aliloke	Partopreno en konferencoj pri daŭropova evoluo
SP2	Invitoj al diversaj kunlaborantoj aliĝi al la Amikaro de Eo	Partopreno en NRO-konferencoj pri alternativa evoluo	Partopreno en konferencoj de lingvo-aktivuloj	Formala alianco kun aliaj NRO-oj pri lingvoj kaj daŭripovo
SP3	Starigo de reto por E-aktivuloj pri sociaj temoj	Plivastigo de la reto; aktivigo en kampanjo	Klerigado de aktivuloj pri lingvopolitiko	Plivastigo de la reto; aktivigo en kampanjo

1.7.1. La starigo de sinsekvaj “temaj jaroj” profunde influos la laboron de KER, ebligante pli longperspektivan planadon kaj evoluigon de taŭgaj argumentoj kaj agmetodoj. La indikitaj temoj estas tre vastaj, lasante grandan flekseblon en la identigo de porokazaj ŝancoj kaj prioritatoj. Baza koncepto ĉi-rilate estas la neceso eliri el la kutimaj kadroj de argumentado por Esperanto, por trakti ĝin en la kunteksto de grandaj demandoj de socia evoluo.

1.7.2. La kontribuo de KER al la publika bildo de Esperanto (SP1) konsistos do en la interpretado de diversaj principoj kaj agadirektoj de la internacia vivo por esperantista publiko, kaj inverse. Kiam UN proklamos difinitajn celojn por sia evoluiga programo, estos la tasko de KER montri kiel Esperanto kaj UEA kontribuas al tiuj celoj, aŭ alternative laboras por aliaj, kompletigaj celoj. La publiko, kiu okupiĝas pri tiaj demandoj, devas vidi Esperanton nek kiel utopion, nek kiel historiaĵon, sed kiel aktivan socian movadon de la nuntempo. Tio postulos zorgan argumentadon, elmetitan en serio de plurlingvaj dokumentoj por legantoj en kaj ekster la movado. Kutime KER kunlaboros kun CED pri tiaj projektoj.

1.7.3. Ĉe tiu pli informita kaj aktiva publiko, KER krome havos la taskon varbi membrojn de la Amikaro (SP2). Kun fokusa temo kiu ŝanĝiĝos de jaro al jaro, KER-aktivuloj havos okazon renkonti aktivulojn sur diversaj kampoj de politiko kaj kulturo, per kies aliĝo la Amikaro fariĝos ĉiam pli diverseca. Tiun diversecon oni devos atente sekvi en la mastrumado de la Amikaro, por certigi ke la informado daŭre nutros la intereson de ĉiuj membroj. Ĝenerale temos pri varbado de individuoj, sed la plano antaŭvidas ankaŭ la starigon de alianco kun aliaj organizoj aktivaj pri lingvo-ekologio en vasta senco. Kompreneble la realecon kaj utilecon de tia paŝo oni devos pritaksi surbaze de konkretaj faktoj.

1.7.4. Tradicie, pri la eksteraj rilatoj de UEA aktivas nur kelkaj homoj en ŝlosilaj urboj (Novjorko, Parizo, Ĝenevo, Vieno) aŭ landoj. Prioritate necesas grandigi tiun surlokan aktivularon, kiu havas la eblon facile partopreni en kunvenoj kaj organizi surlokajn seminariojn kaj aliajn elpaŝojn. Samtempe, la plimultiĝo de internaciaj konferencoj por neregistaraj organizoj, kaj la ĝenerala tutmondiĝo de la agado pri internacia politiko, necesigas la starigon de pli vasta reto de aktivuloj (SP3). Ĝenerale temos pri homoj plejparte jam socie enĝaĝitaj, kies intereso pri Esperanto ligiĝas al aliaj interesoj kaj membreco en diversaj organizoj kaj movadoj. KER havos la taskon varbi tiujn homojn, interkontaktigi ilin, kaj provizi ilin per rimedoj por efika reprezenta agado por kaj per Esperanto. Grava paŝo en tio, enkadre de la ĝenerale trejn-strategio, estos baza klerigado pri lingvopolitikaj demandoj, por povi pridiskuti ilin samnivele kiel aliaj sociaj temoj.



1.7.5. Pli detala strategia laborplano de KER estos la tasko de ĝia unua estraro kunlabore kun Subkomitato 1: Konsciigo.

## 1.8. Strategia laborplano de CED

	2013-14	2014-15	2015-16	2016-17
SP1	Ellaboro de indekso pri lingva justeco; kunlaboro kun KER kaj TIR	Esploroj pri lingva justeco en diversaj landoj	Lanĉo de unua Nitobe-raporto	Diskonigo de la Nitobe-raporto; preparoj por la dua
SP2	Kolokvo pri lingva justeco en landoj de la Sudo	Kolokvo pri lingva justeco en landoj de la Nordo	Nitobe-konferenco pri lingva justeco	Kunlaboro en konferenco pri lingva ekologio
SP3	Bazaj klerigaj rimedoj por kursoj pri interlingvistiko	Bazaj klerigaj rimedoj pri lingvopolitiko	Klerigaj kursoj kaj seminarioj pri lingvopolitiko	Klerigaj kursoj kaj seminarioj pri lingva ekologio

1.8.1. La laborplano de CED emfazas la ellaboron de indekso pri lingva justeco, aldone al ĝia daŭra okupiĝo pri pli vastaj demandoj de lingvopolitiko kaj interlingvistiko. Tiu nova projekto ekdiskutiĝis en 2011 kaj atingis pli konkretan formon en 2012; ĝi celas altiri atenton al la sekvoj de la koncepto de lingva justeco por la agado de registaroj kaj la vivo de civitanoj. Kvankam prognozoj pri tia scienca laboro malfacilas, la plano antaŭvidas lanĉon de la unua raporto iam en 2015-2016, do en la tria jaro de ĉi tiu laborplano.

1.8.2. La kontribuo de CED al la publika bildo pri Esperanto (SP1) do konsistos ĉefe en ĝia laboro pri la indekso, aldone al ĝia kunlaboro kun KER kaj TIR pri la enhavo de diversaj informiloj kaj la retejo [esperanto.net](http://esperanto.net). Verŝajne indos krei apartan paĝaron pri la indeksa projekto, eventuale uzante la nomon Nitobe kiu jam de pluraj jaroj ligiĝas kun similtaj konferencoj organizitaj de CED, ESF kaj diversaj ekstermovadaj institutoj. Rezultoj de la esploroj povos ankaŭ eniri la informadon al la Amikaro de Esperanto.

1.8.3. La indeksa projekto liveros utilan fokuson por diversaj aranĝoj celitaj al esperantista kaj neesperantista publikoj. Plej ofte tiuj okazos kunlige kun UK. La sperto montris, ke tiuj estas tre bonaj okazoj por kreskigi komprenon kaj simpatian inter homoj kiuj profesie okupiĝas pri lingvaj demandoj. Varbi tiajn homojn por la Amikaro (aŭ eventuale por speciala sekcio de ĝi, la Konsilantaro de CED aŭ simile) estos unu el la prioritataj taskoj de CED (SP2).

1.8.4. CED devas ankaŭ okupiĝi pri baza universitatnivela klerigado pri interlingvistiko, ĉu en Esperanto, ĉu en naciaj lingvoj. Tial la laborplano (SP3) antaŭvidas kunlaboron pri tiaj rimedoj en ĉiuj jaroj, kun speciala fokuso al lingvopolitika klerigado en la tria jaro de la plano (prepare al la lanĉo de la raporto pri lingva justeco). Unu celo de tiu laboro estos la kreo de pli granda, lingvopolitike klera kunlaborantaro de CED. Se progresos la laboro de KER, krei aliancon de neregistaraj organizoj ĉirkaŭ la koncepto de lingva ekologio, CED povos ankaŭ ludi gravan rolon en la ellaborado de tiu koncepto kaj en la organizado de komuna konferenco pri la temo.

1.8.5. Pli detala strategia laborplano de CED estos la tasko de ĝia estraro kunlabore kun Subkomitato 1: Konsciigo.

## Agadkampo 2: Kapabligo

### 2.1. Ĝeneralaj celoj

2.1.1. *Baza instruado de Esperanto.* Por ĉiu, kiu deziras lerni Esperanton, disponigi praktikajn lern-rimedojn kaj lern-okazojn ĝis nivelo sufiĉa por ĉiuj ordinaraj komunikaj bezonoj, parole kaj skribe.

2.1.2. *Prilingva kaj kultura klerigado.* Inter tiuj, kiuj uzas la lingvon, kultivi konon kaj aprezon de la historia disvolviĝo, evoluantaj tradicioj kaj nuntempa funkciado de Esperanto en plej diversaj uzkampoj kaj sociaj kunteksto.

2.1.3. *Normigado kaj lingvo-kultivado.* Sistemigi kaj disvastigi normojn por la parola kaj skriba uzado de Esperanto, en la formo de ekzamenoj, gvidiloj, referencaj verkoj kaj simile, kaj eduki la uzantojn al pli ĝusta, lerta kaj krea utiligo de la kapabloj de la lingvo por ĉiuspecaj celoj.

2.1.4. *Instruista kaj aktivula trejnado.* Ĝenerale plialtigi la klarecon kaj kapablecon de tiuj, kiuj ludas aktivan rolon en la organizita Esperanto-movado, kun aparta atento al la kvalito de niaj instruistoj, redaktoroj kaj organizantoj.

2.1.5. *Partopreno en la evoluigo de tutmondeca edukado kaj trejnado.* Kunligi la edukan agadon de la Esperanto-movado kun tiu de parencaj movadoj kaj organizoj, por interalie alvenigi al la komunumo freŝajn konceptojn kaj sperton pri lingvo-instruado, interkultura komunikado kaj kunlernado.

### 2.2. Rolo de UEA

2.2.1. *Kreskigo de agadpovo tutmonde.* Sisteme varbi, trejni kaj subteni instruistojn, redaktorojn kaj organizantojn en movade malfortaj regionoj, laŭ prioritatoj ellaboritaj de la regionaj komisionoj kaj aliaj organizaj partneroj (vidu sube).

2.2.2. *Eldonado kaj disvastigo de kernaj verkoj.* Sur ĉiuj kampoj de la kapabliga agado, aperigi altkvalitajn lernilojn, gvidilojn kaj referencajn verkojn kaj zorgi pri ilia disvastigo tutmonde, inkluzive de malmultekostaj kaj elektronikaj eldonoj por malpli pagipovaj landoj.

2.2.3. *Ellaboro de normoj, studprogramoj kaj ekzamenoj.* Kunlabore kun movadaj kaj ekstermovadaj partneroj, ellabori kaj prizorgi sistemojn por la kultivado kaj testado de difinitaj kapabloj kaj konoj (lingvaj, kulturaj, instruaj, terminologiaj ktp), laŭeble kun iu grado de oficiala rekono ekstermovade.

2.2.4. *Eduka klerigado kaj kunagado.* Peri informojn kaj ideojn, kaj iniciati kaj kunordigi komunajn agadojn, inter la diversaj niveloj kaj branĉoj de la Esperanto-movado kaj difinitaj organizoj kaj movadoj aktivaj pri internacia/tutmondeca edukado kaj pri parencaj fakoj kiel terminologio.

### 2.3. Organizaj rimedoj (por detaloj vidu poste)

2.3.1. *Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI)*. Tiu ĉi aliĝinta faka asocio de UEA jam de multaj jaroj estas la ĉefa movada organizo, kiu sisteme okupiĝas pri la baza instruado de Esperanto kaj pri internaciaj ekzamenoj sur diversaj niveloj. Kun sekcioj en pli ol 30 landoj kaj membroj en pli ol 45, ILEI tamen havas nur malgrandan financon bazon, ĉefe el kotizoj.

2.3.2. *Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO)*. La junulara branĉo de UEA havas longan tradicion de aktivula trejnado, kaj aliron al multaj ekstermovadaj fontoj de subvencioj kaj faka scio. Junaj esperantistoj ofte havas pli da tempo je sia dispono por partopreni en diversaj kursoj kaj seminarioj, kaj do estas natura celgrupo, kaj eventuale ankaŭ gvidantaro, por la kampo Kapabligo.

2.3.3. *Lernu.net*. Lanĉita en decembro 2002, Lernu fariĝis la plej vaste uzata reta Esperanto-lernejo, alirebla en pli ol 30 lingvoj kaj kun multaj diversaj materialoj kaj helpiloj por lernantoj sur diversaj niveloj. Ĝi estas kunlabora projekto inter la junulara organizo E@I kaj la usona fondaĵo ESF, kiu lastatempe anoncis la fondon de la firmao ESF-enrete por prizorgi ĝin cele al financa sendependeco.

2.3.4. *Edukado.net*. Lanĉita jam unu jaron antaŭ Lernu, tiu ĉi retpaĝaro subtenas la laboron de Esperanto-instruistoj per multaj diversaj rimedoj. Ĝi evoluis kiel projekto de ESF gvidata de Katalin Kováts; nun ĝin prizorgas la nederlanda Fondaĵo Edukado.net, kun daŭra subteno de ESF por la redaktado.

2.3.5. *Ekzamenaj komisionoj*. UEA aŭspicias ambaŭ sistemojn de internaciaj ekzamenoj en Esperanto: tiun de UEA-ILEI kaj tiun de la Komuna Eŭropa Referenckadro (KER), en kiu edukado.net ludas kernan rolon. Tiujn formojn de kunlaboro nepras daŭrigi kaj plifortigi.

2.3.6. *Terminologia Esperanto-Centro (TEC)*. Tiu ĉi instanco de UEA fondiĝis en 1987 kun la celo progresigi la konscian, kleran, sistemecan evoluigon de la faka lingvaĵo, sekvante la principojn de la internacia terminologia laboro. Ĝi restas la ĉefa lingvo-kultiva instanco de UEA, kvankam ĝis nun kun relative limigita influo.

2.3.7. *Fondaĵo por Klerigo kaj Kapabligo; Subkomitato 2: Kapabligo*. La Fondaĵo por Klerigo kaj Kapabligo estos nova instanco de UEA kiu donos organizan kadron, en kiu ĉi tiuj diversaj organizoj kaj iniciatoj povas regule interkomuniki, kunlabori kaj kunplani. Ĝin gvidos Subkomitato 2: Kapabligo, kies membraro inkluzivos almenaŭ du estraranojn, plurajn komitatanojn el la Konsilio, kaj laŭbezone pliajn reprezentantojn de la ĉi-supraj agadoj kaj organizoj.

## 2.4. Strategiaj prioritatoj sur Agadkampo 2

**Strategia prioritato 2.1. Kursoj kaj ekzamenoj.** Plimultigi la homojn, kiuj sukcese trapasis registritan kurson kaj internacian ekzamenon pri Esperanto, i.a. por pli fidinde pritaksi, kiom la lingvo disvastiĝas ĉiujare. Tiucele:

- plibonigi la raportadon kaj disvastigon de informoj pri kursoj sur ĉiuj niveloj, inkluzive de informoj pri la uzataj materialoj, metodoj, celata lingvo-nivelo, nombro de kursanoj en la komenco kaj fino, ktp, laŭ modelo de la “Kursejo” de edukado.net;
- konsekvence reklami la KER-ekzamenojn (i.a. kiel necesan kvalifikon por ĉiuj gvidaj aktivuloj), kaj ellabori novajn manierojn ekzameniĝi, laŭ modelo de la internacia ekzamentago elprovita de edukado.net en 2012;
- elstarigi kaj detale priskribi sukcesajn modelojn de kursoj kaj ekzamenoj, inkluzive de lernejoj studprogramoj, stimulante ilian imitadon kaj adaptadon en ĉiam pli da lokoj.

**Strategia prioritato 2.2. Trejnado de gvidaj aktivuloj.** Starigi programojn por la trejnado de movadaj organizantoj (de projektoj, renkontiĝoj kaj kongresoj, asocia administrado kaj financo, monvarbado k.s.), instruistoj, tekstumantoj (prizorgantoj de retpaĝoj, revuoj k.s.), tradukantoj, terminologoj kaj informaktivuloj. Tiucele:

- dokumenti kaj pritaksi la jamajn proponojn pri instruista trejnado (ILEI, UAM, RITE, aliaj) kaj pri trejnado de aktivuloj diversspecaj (de TEJO, diversaj landaj kaj fakaj asocioj);
- esplori la aktualan staton de tia trejnado ekster la movado, ĉerpante el tio ideojn kaj metodojn aplikeblajn en Esperanto-kunteksto, laŭeble per la efektiva trejnado de aktivuloj kiuj reportas siajn novajn sciojn kaj kapablojn en la movadon;
- kunlabore kun la plej spertaj trejnantoj kaj praktikantoj en la koncerna fako, ellabori normojn, priskribojn de la enhavo kaj trejnmetodoj, kaj modularan skemon por la organizado de kursoj kaj seminarioj pri tiu fako;
- enkadre de edukado.net, laŭ modelo de ĝia jam funkcia Reta Instruista Trejnado aŭ la fako “Liberaj studoj,” krei kaj reklami virtualajn kursojn kiuj sekvas tiujn ellaboritajn programskemojn;
- stimuli kaj subteni la organizadon de parencaj ĉeestaj kursoj kaj seminarioj diverslande, kaj la disvolviĝon de reto de spertaj trejnantoj kaj organizantoj;
- laŭeble profiti de ekstermovadaj subvencioj por tiuj ĉi specoj de kapabliga agado, kaj strebi por ĉi ties ekstermovada agnosko.

**Strategia prioritato 2.3. Esperanto kiel eduka movado.** Kunlabori kun organizoj sur ĉiuj niveloj de la movado por doni al instruado, trejnado, kaj tutmondeca edukado pli altan prioritaton en la planado, komunikado kaj agado. Tiucele:

- en la informado, multlingve dokumenti kaj elstarigi la edukajn valorojn de la lingvo kaj ĝia kulturo en instruprogramoj kaj neformala edukado;
- en la eksteraj rilatoj, pli sisteme kaj intense kunlabori kun internaciaj kaj naciaj organizoj kies eduka agado (almenaŭ parte) kongruas kun la celoj de UEA, por reciproka interkonatiĝo, pliriĉiĝo je ideoj kaj metodoj, kaj praktika kunagado.
- kadre de la komunumo, plibonigi la komunikadon pri lernado, instruado kaj aliaj priedukaj temoj ĝenerale, per regulaj rubrikoj kaj raportoj en landaj revuoj, retpaĝoj k.s., per prelegoj, kursoj kaj seminarioj enkadre de landaj kaj regionaj renkontiĝoj, kaj per aliaj klerigaj rimedoj kiel filmoj kaj libroj.

## 2.5. Tempoplanado laŭ jaroj

2.5.1. La unua jaro de ĉi tiu laborplano (2013-14) fokusiĝas al la starigo de pli sistema, harmonia kaj celorientita kunlaboro inter la diversaj organizoj listigitaj ĉi-supre, la ellaboro de regionaj strategioj, la funkciigo de pli efikaj sistemoj de komunikado kaj dokumentado, kaj la disvolvado de rilatoj kun aliaj edukaj organizoj. La lanĉo de la Fondaĵo por Klerigo kaj Kapabligo, verŝajne en la UK de 2014, markos la kulminon de tiu jaro de plifortigo de la organiza bazo.

2.5.2. Novembro 2014 markos la 60jariĝon de la Unesko-rezolucio de Montevideo, kiu komisiis la Ĝeneralan Direktoron de Unesko “sekvi la kurantan evoluon en la uzado de Esperanto en scienco, edukado kaj kulturo”. Tio donos okazon por fari bilancon de la ĉefaj atingoj kaj nuntempa uzado de Esperanto sur tiuj kampoj – unuflanke por ekstera publiko, sed ankaŭ por klerigi la esperantistojn. “Montevideo 60” estos speco de eduka kampanjo por la jaro 2014-15, celanta ĝenerale plibonigi la konon de la evoluo de Esperanto tra la lastaj sesdek jaroj.

2.5.3. La tria jaro, 2015-16, estos eksperimenta Jaro de la Lernanto. Interalie ĝi celos esti jaro de rekordoj: plej multaj lernantoj registritaj en diversnivelaj kursoj, plej multaj kursfinintoj kaj ekzamenitoj, ktp. Sed ĝi ankaŭ celos provoki novajn ideojn pri pedagogio, pri subteno al dumviva lernado en kaj ekster formalaj kursoj, pri la valoroj kiujn Esperanto proponas al lernantoj diverslande kaj diverskuntekste, ktp.

2.5.6. Provizore, por la kvara jaro (2016-17) oni antaŭvidu la lanĉon de dua kampanjo kunlige kun la 25a datreveno de la Rio-konferenco pri daŭropova evoluo. Same kiel la unua kampanjo prezentos Esperanton kadre de tutmondaj streboj krei pli prosperajn, pacajn kaj sekurajn sociojn, la dua kampanjo prezentos ĝin kadre de klopodoj restarigi sanajn kaj daŭropovajn lokajn kulturojn. En tio la graveco de lingvo-konservado kaj lingvo-planado, inkluzive de terminologio kaj lingvo-instruado, estos parto de la kerna mesaĝo.

## 2.6. Strategia laborplano de UEA kunlabore kun ILEI

	2013-14 <i>Kunlaborkadro</i>	2014-15 <i>Montevideo 60</i>	2015-16 <i>Jaro de Lernanto</i>	2016-17 <i>Daŭropova evoluo</i>
SP1	Kursdokumentado, laboro pri reta kurso e125, kunlaboro pri multlingvigo de materialoj kaj aktivigo de lernantoj per SES-tipaj aranĝoj	Ekzamenoj pri kulturaj/fakaj konoj; lanĉo de preta kurso e125 en la lingvoj de lernu!; reta kurso sur KER-niveloj B1-B2	Fokuso al moderna E-pedagogio: kursoj, seminarioj, konferencoj; novaj bazaj kaj progresigaj kursoj en ĉiuj kontinentoj	Ellaboro de kursoj kaj kursmoduloj pri Esperanto kadre de programoj pri lingva kaj kultura diverseco, internaciismo, tutmondaj studoj k.s.
SP2	<i>Instruista trejnado:</i> Bazaj esploroj; plan-dokumento kun skemo kaj normoj. <i>Aktivula trejnado:</i> kunlaboro pri dokumentado de rimedoj, bezonoj	<i>Instruista trejnado:</i> Ellaboro de oficiala programo konsulte kun ALTE. <i>Aktivula trejnado:</i> kunlaboro pri la kreo de retaj/ĉeaj kursoj pri bazaj movadaj aktivaĵoj	<i>Instruista trejnado:</i> Testa program-lanĉo, laŭeble en altlernejo. <i>Aktivula trejnado:</i> Kunlaboro pri trejnado pri kurs-organizado (lingva kaj alispeca)	<i>Instruista trejnado:</i> Reviziado de la programo; plena lanĉo. <i>Aktivula trejnado:</i> Kunlaboro pri trejnado pri fulmkursoj kaj modelaj lecionoj en lingvo-foiroj kaj similaj okazoj
SP3	Katalogado de asocioj por edukado internacieca/tutmondeca; disvolvado de eksteraj rilatoj/informado ĉi-kampe	Eldonaĵoj, aranĝoj por rekonigi edukon laboron de lastaj 60 jaroj; kalendaro de internaciaj edukaj tagoj, eventoj.	Kursoj, seminarioj pri starigo de subvenciataj projektoj en kunlaboro kun ekstermovadaj lernejoj, organizoj	Kunlaboro kun aliaj organizoj pri integrado de E-kursoj ene de iliaj konferencoj kaj studprogramoj.

2.6.1. Ĝenerale, la strategio celas doni plian organizan kaj financon subtenon al ILEI por ebligi al ĝi plenumi ankoraŭ pli vastan kaj esencan rolon sur la kampo Kapabligo. Tiu evoluo okazos unue sur la nivelo de estrara kundecidado kaj informfluo, sed en la unua jaro ricevos ankaŭ formalan agnoskon per komuna detala laborplano. Interalie, oni konsideru la eblon kunigi la membrosistemojn de UEA kaj ILEI, tiel ke UEA kolektu kaj administru la kotizojn simile kiel ĝi faras por TEJO.

2.6.2. En la ĉi-supra tabelo, ĉiu jaro konstruas sur la atingoj de la antaŭa, kaj inverse, ĉiu jaro devas inkluzivi preparojn por la sekvonta jaro. Certagrade, do, la postuloj plialtiĝas de jaro al jaro. UEA kaj ILEI kunlaboros en ĉio ĉi kun edukado.net, lernu.net kaj aliaj partneroj, do la tuta pezo neniam falos sur nur unu organizon.

2.6.3. Pli vastaj disponigo kaj gamo de kursoj kaj ekzamenoj (SP1) estos realigataj iom post iom, unue per la kompletigo de la reta kurso e125 (tasko por du jaroj), kaj per evoluigo de ekzamenoj pri kulturaj kaj fakaj konoj, kiuj kompletigas la lingvan fokuson de la KER-ekzamenoj. Same bonvena estas la disvastiĝo al aliaj kontinentoj de plurtagaj kursaroj laŭ la modelo de la slovakia Somera Esperanto-Studado. La Jaro de la Lernanto donos okazon por amplekse pritaksi la nunan staton de la E-pedagogio kaj peli la pensadon kaj praktikadon de E-instruado en novaj direktoj. Ankaŭ la emfazo, en la kvara jaro, pri integrado de Esperanto en programoj de tutmondaj studoj k.s. espereble stimulos la kreemon de niaj instruistoj kaj kurs-verkistoj.

2.6.4. Sur la kampo de instruista kaj aktivula trejnado (SP2), la ĉefa prioritato por UEA-ILEI estas la ellaboro de programo de instruista trejnado kiu konformas al naciaj/internaciaj normoj kaj laŭeble povas ricevi agnoskon de la Asocio de Lingvo-

Testistoj de Eŭropo. Kiel montras la tabelo, tiu laboro daŭros tra ĉiuj kvar jaroj. Samtempe, ILEI povos kunlabori pri diversaj aliaj iniciatoj pri aktivula trejnado.

2.6.5. La ĝenerala klerigado kaj aktivigo de la movado pri edukado en vasta senco (SP3) disvolviĝos en proksima rilato kun la kresko de kontaktoj kun edukaj organizoj ekstermovadaj. Tiuj kontaktoj unuflanke devigos nin pli efike kaj alloge klarigi la edukan rolon de Esperanto (ankaŭ por ni mem), kaj aliflanke alportos freŝajn ideojn kaj ŝancojn por kunagado enkadre de programoj financataj ekstermovade. Tia kunagado ricevos apartan atenton en la kvara jaro de la laborplano, sed en malpli ambiciaj formoj povas disvolviĝi pli frue – tio estus la celo de la eduka kalendaro menciita en jaro 2.

## 2.7. Strategia laborplano de UEA kunlabore kun Lernu.net

	2013-14 <i>Kunlaborkadro</i>	2014-15 <i>Montevideo 60</i>	2015-16 <i>Jaro de Lernanto</i>	2016-17 <i>Daŭropova evoluo</i>
SP1	Kursdokumentado, kunlaboro pri reta kurso e125, multlingvigo de materialoj kaj aktivigo de lernantoj per SES-tipaj aranĝoj	Kunlaboro pri lanĉo de reta kurso e125 en la lingvoj de lernu!; nove reta kurso sur KER-niveletoj B1-B2; kurso(j) pri kulturaj/fakaj konoj	Kunlaboro pri pedagogiaj kursoj, seminarioj, konferencoj, kaj pri utiligo de lernu.net en novaj bazaj kaj progresigaj kursoj en ĉiuj kontinentoj	Kunlaboro pri la kreo de kursoj kaj kursmoduloj pri Esperanto kadre de programoj pri lingva kaj kultura diverseco, internaciismo, tutmondaj studoj k.s.
SP2	<i>Aktivula trejnado:</i> kunlaboro pri dokumentado de rimedoj, bezonoj (ekz. de la lingvohelpantoj kaj tradukantoj kiuj kunlaboras en lernu.net)	<i>Aktivula trejnado:</i> kunlaboro pri la kreo de retaj/ĉeaj kursoj pri bazaj movadaj aktivaĵoj, kunlige kun moduloj de lernu.net (ekz. pri organizado de E-aranĝoj)	<i>Aktivula trejnado:</i> kunlaboro pri trejnado pri kurs-organizado laŭ la modeloj de SES kaj de la retaj kursoj	<i>Aktivula trejnado:</i> kunlaboro pri trejnado pri informado/eksteraj rilatoj en la kunteksto de lingvo-foiroj, alternativa edukado, junularaj asocioj k.s.
SP3	Kunlaboro en la katalogado de retaj rimedoj por edukado internacieca/tutmondeca; disvolvado de eksteraj rilatoj/informado ĉi-kampe	Kunlaboro pri eldonaĵoj, aranĝoj por rekoni edukan laboron de lastaj 60 jaroj; kontribuo de la Mediateko al prezentado de la E-kulturo	Kunlaboro pri kursoj, seminarioj pri starigo de subvenciataj projektoj en kunlaboro kun ekstermovadaj lernejoj, organizoj	Kunlaboro kun aliaj organizoj pri integrado de E-kursoj ene de iliaj konferencoj kaj studprogramoj.

2.7.1. La strategio celas interproksimigi la komunumon kaj rimedaron de lernu.net kun la eduka evoluo de la movado ĝenerale. Tio implicas reciprokan lernadon kaj adaptiĝon: la sukcesoj de lernu.net en la kreo de reta lernejo kaj la lanĉo de la Someraj Esperanto-Studadoj donas utilajn rimedojn kaj modelojn por la movado en multaj mondopartoj; aliflanke la diversaj iniciatoj de ILEI, edukado.net kaj aliaj partneroj liveras novajn kuntekstojn, metodojn kaj enhavon por progresigaj kursoj, interkultura lernado kaj simile.

2.7.2. Teme pri SP1 (kursoj kaj ekzamenoj), Lernu.net lanĉas novan kurson en la mezo de 2013, sur KER-niveletoj A1-A2, kaj planas daŭrigi per plia(j) kurso(j) sur KER-niveletoj B1-B2 en la sekvonta jaro. Lernantoj ricevos instigojn kandidatiĝi por la KER-ekzamenoj. Tiujn evoluojn indas kompletigi per kursoj celantaj kleriĝon pri la historio, kulturo, idearo kaj la nuna funkciado de Esperanto, kunlige kun la laboro de ILEI por funkciigi ĉi-

rilatajn ekzamenojn. Krome lernu.net povus ludi gravan rolon en la disvastigo de la nova reta kurso e125 kaj en la organizado de surlokaj kursoj diverskontinente, kiuj utiligas ĝiajn rimedojn. Ĝi plie subtenu la evoluigon de kursetoj liverablaj al poŝtelefonoj kaj similaj porteblaj komunikiloj.

2.7.3. Lernu.net jam kunlaborigas grandan volontaron, kaj do aktivula trejnado (SP2) povus esti grava dimensio de ĝia agado. La lernu-teamo intencas plivastigi la funkcion de la retejo por kovri multajn aliajn bazajn aktivaĵojn de la movado, ekzemple la organizadon de renkontiĝoj. Ĉi tiu strategio antaŭvidas, ke ĉiun tian modulon akompanos sistemo de aktivula trejnado, ellaborita laŭ la ĝeneralaj principoj skizitaj ĉi-supre pri instruista trejnado. Tiel lernu.net povus fariĝi grava lernejo ankaŭ por la praktikaj aspektoj de movada aktivado.

2.7.4. Tre interesa estas la potencialo de lernu.net kiel perilo de kontaktoj kaj kunlaboro kun aliaj edukaj movadoj (SP3). Kiel la plej multlingva Esperanto-retejo (kaj inter la plej multlingvaj volontulaj retejoj, kiujn eblas spuri en la reto), ĝi konsistigas fortikan bazon por multlanda, multlingva komunikado kaj kunlaboro sur la eduka kampo. Kiel tio aspektos, dependos parte de la disvolvado de edukaj eksteraj rilatoj kadre de la strategio pri Kapablo, sed la plano antaŭvidas kontribuojn de la lernu-teamo al seminarioj pri subvenci-serĉado kaj projekto-organizado, kaj kunlaboron pri la organizado de E-kursoj por diversaj edukistaj publikoj.

## 2.8. Strategia laborplano de UEA kunlabore kun Edukado.net

	2013-14 <i>Kunlaborkadro</i>	2014-15 <i>Montevideo 60</i>	2015-16 <i>Jaro de Lernanto</i>	2016-17 <i>Daŭropova evoluo</i>
SP1	Pli vasta uzo de la Kursejo; ellaboro de reta memtaksilo por lernantoj; 2a tutmonda KER-sesio; provado de skajpaj ekzamenoj; ellaboro de kursmodeloj	Lanĉo de la reta memtaksilo; 3a tutmonda KER-sesio; ekfunkciigo de retaj parolsesioj de KER; lanĉo de perfektigaj retaj kursoj kaj KER-preparkursoj	Kunlaboro pri kursoj, seminarioj, konferencoj; plia integriĝo kun retejoj de lernu.net, ILEI por popularigi "dumvivan" lernadon	Kunlaboro pri kursoj kaj kursmoduloj pri Esperanto kadre de programoj pri lingva kaj kultura diverseco, internaciismo, tutmondaj studoj k.s.
SP2	<i>Instruista trejnado:</i> Kunlaboro en bazaj esploroj kaj pretigo de plan-dokumento; plua popularigo de RITE; pluraj regionaj ĉeestaj trejnadaj dise en la mondo <i>Aktivula trejnado:</i> Reta kunlaboro	<i>Instruista trejnado:</i> Ellaboro de oficiala trejnprogramo konsulte kun ALTE kaj surbaze de la spertoj kun RITE kaj aliaj trejnadaj dise en la mondo <i>Aktivula trejnado:</i> Eksteraj rilatoj/lobiado.	<i>Instruista kaj aktivula trejnado:</i> Kunlaboro pri testa program-lanĉo, laŭeble en altlernejo; videoteko pri instrumentoj <i>Aktivula trejnado:</i> Eventorganizado.	<i>Instruista kaj aktivula trejnado:</i> Reviziado de la programo; plena lanĉo, kun diversaj regionaj ĉeestaj trejnadaj dise en la mondo <i>Aktivula trejnado:</i> Organiza planado kaj disvolvo.
SP3	Kunlaboro pri katalogado de asocioj por edukado internacieca/tutmondeca; plano pri multlingva prieduka retejo por subteni tiajn rilatojn	Kunlaboro pri eldonaĵoj, aranĝoj por rekoni edukan laboron de lastaj 60 jaroj; kalendaro de internaciaj edukaj tagoj, eventoj.	Kunlaboro pri kursoj, seminarioj pri starigo de subvenciataj projektoj en kunlaboro kun ekstermovadaj lernejoj, organizoj	Trejnado de instruistoj por kunlaboro kun aliaj organizoj pri integriado de E-kursoj ene de iliaj konferencoj kaj studprogramoj.



2.8.1. Edukado.net jam prezentas la plej grandan kolekton de informoj kaj rimedoj por instruistoj en la movado, kaj ludas gvidan rolon en la disvolvado de la KER-ekzamenoj. La strategio celas rekoni kaj subteni tiun agadon, tiel ke edukado.net fariĝu kvazaŭ informcentro por la agadkampo Kapabligo. Pri tiu evoluo, kaj pri adekvata financa, teknika kaj volontula subteno al la redaktoro, respondecos la Fondaĵo por Klerigo kaj Kapabligo (vidu ĉe 10, sube).

2.8.2. La kontribuoj de edukado.net pri kursoj kaj ekzamenoj (SP1) estas jam sufiĉe evidentaj, kaj ĉefe necesas mobilizi instruistojn kaj lernantojn por plene profiti de tiuj ebloj. Pli longperspektive, indas pripensi la plian integriĝon de edukado.net kun lernu.net kaj la retejo de ILEI, kunlige kun la koncepto de “dumviva lernado,” t.e. la ideo ke esperantistoj portas respondecon pri daŭra sinklerigado, ne nur pri la lingvo mem, sed ankaŭ pri la mondo en kiu ĝi estas uzata (SP3).

2.8.3. Ankaŭ instruista trejnado (SP2), prioritato por ILEI, estas granda prioritato por edukado.net, kaj la trejnprogramo ellaborota konsulte kun ALTE certe utiligos la spertojn pri RITE, la Reta Instruista Trejnado lanĉita en 2011. Sur tiu bazo, oni ankaŭ laboros por pretigi kursojn pri aliaj temoj, kiel reta kunlaboro (jaro 1), eksteraj rilatoj kaj lobiado (jaro 2), eventorganizado (jaro 3) kaj organiza planado kaj disvolvado (jaro 4). Same kiel edukado.net ludas kernan rolon en la administrado kaj realigo de la KER-ekzamenoj, ĝi kredeble kunrespondecos pri la praktika efektivigo de tiuj diversaj trejnprogramoj.

2.8.4. La fakaj scioj kaj rimedoj de edukado.net grave kontribuos al la kapabloj de la esperantistoj kunlabori kun aliaj edukaj movadoj kaj organizoj (SP3). Aliflanke, por ludi vere kernan rolon en tiu aspekto de la agado, la retejo devos trovi manieron funkcii ankaŭ multlingve, aŭ ligiĝi al multlingva prieduka paĝaro. Ellaboro de strategio tiurilate estos unu el la taskoj por la unua jaro.

## 2.9. Strategia laborplano de TEC

	2013-14 <i>Kunlaborkadro</i>	2014-15 <i>Montevideo 60</i>	2015-16 <i>Jaro de Lernanto</i>	2016-17 <i>Daŭropova evoluo</i>
SP1	Enretigo de faritaj terminaroj, reverko de la TEC-retejo por faciligi ilian utiligon kaj prikomentadon; preparesploroj por reta kurso pri terminologio	Ellaboro de reta kurso pri terminologio	Lanĉo de reta kurso pri terminologio	Kunlaboro pri kursoj pri terminologio en malpli uzataj lingvoj
SP2	<i>Aktivula trejnado:</i> varbado por la Somera Terminologia Trejnado en Vieno; trejnseminario por fakaj asocioj en UK	<i>Aktivula trejnado:</i> varbado por la Somera Terminologia Trejnado en Vieno; trejnseminario por fakaj asocioj en UK	<i>Aktivula trejnado:</i> varbado por la Somera Terminologia Trejnado en Vieno; trejnseminario por fakaj asocioj en UK	<i>Aktivula trejnado:</i> varbado por la Somera Terminologia Trejnado en Vieno; trejnseminario por fakaj asocioj en UK
SP3	Pretigo de informiloj pri TEC kaj terminologio en pluraj lingvoj; reverko de la TEC-retejo por multlingva publiko	Eldonaĵoj, aranĝoj por rekoni terminologian laboron de lastaj 60 jaroj	Kunlaboro pri terminologiaj aspektoj de lingva justeco (vidu ĉe Konsciigo)	Kunlaboro kun aliaj organizoj pri terminologiaj bezonoj de malpli uzataj lingvoj

2.9.1. Post periodo de senaktiviĝo, TEC komencas revastigi sian agadon ĉe la Internacia Organizo por Normigo (ISO) kaj Infoterm en Vieno, kaj samtempe kultivi intereson kaj komprenon pri terminologio inter esperantistoj. La strategio celas subteni tiun agadon kaj ligi ĝin pli forte kun aliaj edukaj kaj lingvopolitikaj agadoj de UEA.

2.9.2. La laboro de TEC pri kursoj kaj ekzamenoj (SP1) ligiĝas plejparte al la pretigo de reta kurso pri terminologio, bazita almenaŭ parte sur la libroforma kurso de Jan Werner kaj sur diversaj eldonaĵoj de Infoterm. La spertoj gajnitaj en la ellaboro de tiu kurso povos poste uziĝi por adapti ĝin al la bezonoj de diversaj malpli uzataj lingvoj, kiuj frontas terminologiajn defiojn tre similajn kaj ofte akutajn. Samtempe daŭros la laboro por enretigi ĉiujn ekzistantajn terminarojn, kiel baza eduka materialo por tiuj kiuj volas okupiĝi pri la kampo.

2.9.3. Pri aktivula trejnado (SP2), TEC havas jam sufiĉe klaran rolon en la reklamado de studlokoj en la terminologia somera lernejo de Infoterm. Al tio aldoniĝos regulaj trejnadaj de respondeculoj el diversaj fakaj asocioj, kadre de UK aŭ eventuale aliaj aranĝoj.

2.9.4. Kiam temas pri rilatoj kun aliaj edukaj movadoj kaj organizoj (SP3), TEC restos forte ligita al la laboro de ISO kaj Infoterm. Aliflanke, per la enplektado de TEC en esplorojn pri lingva justeco (tasko de CED, ĉe Konsciigo), povus malfermiĝi ŝancoj por senpera kunlaboro kun diversaj organizoj por malpli uzataj lingvoj, en kiuj la spertoj kaj scioj de esperantistoj montriĝos utilaj ankaŭ por alilingvanoj.

## 2.10. Strategia laborplano de la Fondaĵo por Klerigo kaj Kapabligo

	2013-14 <i>Kunlaborkadro</i>	2014-15 <i>Montevideo 60</i>	2015-16 <i>Jaro de Lernanto</i>	2016-17 <i>Daŭropova evoluo</i>
SP1	Ellaboro de regionaj kaj landaj strategioj por kreskigi kursojn, ekzamenojn; dokumentado kaj pritaksado de kursoj	Fokuso al kursoj kaj ekzamenoj pri kulturaj kaj fakaj konoj, progresigaj kursoj, enmovadigo de lernantoj; reta kurso e125	Fokuso al moderna E-pedagogio; novaj kursoj en ĉiuj kontinentoj; reteja integriĝo; reta kurso pri terminologio	Fokuso al la integrado de Esperanto en programoj pri lingva kaj kultura diverseco, tutmondaj studoj k.s.; terminologio en malpli uzataj lingvoj
SP2	<i>Instruista trejnado:</i> Bazaj esploroj; plan-dokumento <i>Aktivula trejnado:</i> Dokumentado de rimedoj, bezonoj; reta kunlaboro; terminologio en UK	<i>Instruista trejnado:</i> Ellaboro de oficiala trejnprogramo <i>Aktivula trejnado:</i> Trejnado pri eksteraj rilatoj/lobiado kaj pri terminologio	<i>Instruista trejnado:</i> Testa program-lanĉo <i>Aktivula trejnado:</i> Trejnado pri event-organizado, terminologio	<i>Instruista trejnado:</i> Reviziado kaj plena lanĉo <i>Aktivula trejnado:</i> Trejnado pri organiza planado kaj evoluigo; terminologia trejnado
SP3	Katalogado de edukaj organizoj; eksteraj rilatoj/informado pri edukado; multlingva retejo pri edukado; subvenci-serĉado	Eldonaĵoj, aranĝoj por rekoni edukan laboron de lastaj 60 jaroj; internacia eduka kalendaro; subvenci-serĉado	Kursoj, seminarioj pri la gvidado de ekstermovade subvenciataj projektoj	Kunlaboro kun aliaj organizoj pri integrado de E-kursoj ene de iliaj konferencoj kaj studprogramoj

2.10.1. La Fondaĵo celas doni koheran organizan kadron al la kunlaboro sur la agadkampo Kapabligo. Ne eblas en unu malgranda tabelo resumi ĉiujn aspektojn de tiu kunlaboro, kiujn ni jam mallonge skizis en la ĉi-supraj ĉapitroj. Temas ĉi tie nur pri resumo de la kernaj emfazoj, kiujn ne necesas plue prikomenti.

2.10.2. La interligado de diversaj organizoj kaj agadoj, kiuj tradicie funkciis pli-malpli sendepende, ne povas okazi tuje kaj senprobleme. Temos pri procezo kiu daŭros tra ĉiuj kvar jaroj de ĉi tiu laborplano kaj verŝajne ankoraŭ post tio. Per kunlaboro pri komunaj interesoj kaj celoj, enkadre de komuna strategio, estiĝos bazo por pli profunda integriĝo, kies formoj ne povas esti antaŭdifinitaj.

2.10.3. Ĉi tie ni traktis nur la internacian nivelon de la agado, sed kompreneble la kapabliga agado okazas ofte en nacia aŭ regiona kunteksto. ILEI havas siajn landajn sekciojn, lernu.net siajn lingvoversiojn, kaj UEA siajn landajn asociojn kaj regionajn komisionojn. Integrado kaj plivastigo de E-instruado kaj trejnado havos profundajn sekvojn por tiuj diversaj branĉoj de la movado, kaj la Fondaĵo devos alfronti la defion, kiel fari ilian kunlaboron laŭeble efika kaj harmonia. Pri tio temas pli amplekse ĉe la agadkampo Kunordigo.

2.10.4. Ne traktita ĉi tie estas ankaŭ la baza demando de rimedoj. La usona fondaĵo ESF ĝis nun pagis la kostojn de lernu.net kaj edukado.net, kun iom da enspezoj pro donacoj, reklamoj kaj vendoj. ILEI financas sian agadon ĉefe per kotizoj, kiuj apenaŭ sufiĉas por kovri la eldonadon de ĝiaj revuoj kaj la bazajn administrajn kostojn. UEA havas malgrandan jaran buĝeton por edukado sub la rubriko "Movada evoluigo," kaj krome administras siajn proprajn fondaĵojn. Unu celo de la Fondaĵo devas esti ĝenerala plifortigo de la financa bazo de la agadkampo Kapabligo, por ne nur sekurigi la rutinajn agadojn sed ankaŭ doni rimedojn por novaj iniciatoj. Tiurilate la serĉado de subvencioj estas tre grava elemento en la kontaktoj kun aliaj edukaj organizoj (SP3). Ankaŭ la varbado de donacoj kaj la vendado de varoj kaj servoj estas evoluigindaj kiel konstantaj fontoj de rimedoj.

## Agadkampo 3: Komunumo

### 3.1. Ĝeneralaj celoj

3.1.1. *Kreskigi la uzadon de Esperanto por ĉiuspecaj celoj.* Jam dekomence tiu estas kerna celo de UEA, kiun oni foje traktas sub la nomoj “utiligo,” “aplikado,” “faka agado” kaj simile. Ju pli diversaj, viglaj kaj kvalitaj estas tiuj uzoj, des pli grandaj estos la ŝancoj, ke difinita lernanto trovos ion por kontentigi sin en la movado.

3.1.2. *Tutmondigi partoprenon en la Esperanto-kulturo.* Ankoraŭ estas tro facile senti, ke estas “centroj” kaj “periferioj” en la movado. Por ke lingvo estu tutmonda, ne sufiĉas nomi ĝin tia. Tial gravas trovi malmultekostajn manierojn disvastigi kulturajn produktojn kaj faciligi kontribuojn al internaciaj kulturaj projektoj.

3.1.3. *Plifortigi la movadan merkaton por varoj kaj servoj.* Kvankam malgranda, la Esperanto-movado tamen jam havas propran ekonomion. Per ĝia pligrandigo kaj plifaciligado prosperos pli da kulturaj agantoj.

3.1.4. *Disvolvi solidarajn helpagadojn inter esperantistoj.* Jam multaj esperantistoj en pli riĉaj landoj helpas tiujn en pli malriĉaj. Necesas kreskigi la amplekson kaj kvaliton de tiaj helpagadoj trans ekonomiajn kaj politikajn dividojn.

### 3.2. Rolo de UEA

3.2.1. *Delegita Reto.* Jam de la fondo de UEA, la Delegita Reto celas doni al individuaj membroj pli aktivan kaj konkretan rolon en la vivo de la Asocio. Post modernigo, ĝi povus kontribui al ĉiuj aspektoj de ĉi tiu agadkampo.

3.2.2. *Fakaj asocioj.* Alia tradicia parto de la UEA-strukturo, la fakaj asocioj devas faciligi komunan agadon sur difinitaj uzkampoj. Por efike kontribui al la komunumo, ili bezonas pli grandan teknikan kaj strategian subtenon.

3.2.3. *Landa kaj regiona agado.* En la lastaj dudek jaroj, kreiĝis sistemo de regionaj komisionoj, kiuj faciligas kontinentan kunlaboron inter diverslandaj asocioj kaj lokaj grupoj. Plifortigo de tiu sistemo povas kontribui al ĉiuj aspektoj de ĉi tiu agadkampo.

3.2.4. *Libroservo.* UEA havas la plej grandan libroservon de la movado, kiun oni devas plivastigi al plenfunkcia reta vendejo kaj komunumo de uzantoj, kun aldono de recenzoj, komentoj, forumoj k.s.

3.2.5. *Kongresoj.* La Universalaj Kongresoj estas senkompare la plej grandaj kunvenoj de esperantistoj, kaj do ankaŭ gravaj kulturaj okazaĵoj, kiuj kontribuas al ĉiuj aspektoj de ĉi tiu agadkampo. La samo validas, en malpli granda skalo, pri la Internaciaj Junularaj Kongresoj. Abundas aliaj kongresoj landaj, regionaj, fakaj ktp; pri ili UEA foje ludas ŝlosilan rolon, foje apenaŭ videblas. Necesas pli konsekvenca kaj antaŭenrigarda kongres-politiko, kiu alportas pluraspektan modernigon.

3.2.6. *Eldonaĵoj kaj retpaĝaro.* Per sia revuo *Esperanto*, la Jarlibro, diversaj libroj, videoj kaj aliaj eldonaĵoj, UEA helpas difini la bazon de la nuntempa Esperanto-kulturo. Necesas tion fari pli konsekvence kaj strategie, ankaŭ per la novaj rimedoj de la reto, ekzemple per multe pli vasta eldonado de videoj kaj sonmaterialoj.

3.2.7. *Belartaj konkursoj.* La konkursoj celas stimuli kaj rekoni artan kreadon en Esperanto. Ju pli prestiĝaj kaj konataj ili fariĝas, des pli granda ilia kontribuo al ĉi tiu agadkampo.

3.2.8. *Fondaĵoj.* Tra la jaroj UEA starigis multajn fondaĵojn, kelkajn kun propra kapitalo, aliajn kiuj disponas nur pri la sumo de la jaraj donacoj. La fondaĵoj estas grava fonto de subteno por movadanoj en pli malriĉaj aŭ movade malfortaj landoj.

### **3.3. Organizaj rimedoj (por detaloj vidu poste)**

3.3.1. *Centra Oficejo.* Necesas agnoski la fundamentan rolon de la Oficejo de UEA sur ĉi tiu agadkampo. Multaj aspektoj de la “komunuma vivo” de UEA dependas de la organizaj kaj kunordigaj fortoj de la CO. Aliflanke, la laborfortoj de la Oficejo estas limigitaj, tiel ke necesas bazi ĉi tiun strategion sur pli vasta kaj celkonscia kunlaboro inter la oficistoj kaj diversaj volontulaj fortoj. La evoluigo de sistemoj por ebligi tion estos unu el la ŝlosiloj al sukcesa realigo de la ĉi-subaj planoj.

3.3.2. *Centro por Kultura Evoluigo.* Tiu ĉi nova instanco de UEA estos speco de kultura konsilantaro, konsistanta el homoj aktivaj sur diversaj kampoj de la komunuma vivo. Inter ĝiaj ĉefaj taskoj: kunlabori kun la Centra Oficejo pri la evoluigo de (memfinancaj) servoj al la komunumo; kontribui al la planado kaj organizado de tutmondaj kulturaj projektoj kiel Vikipedio kaj Muzaiko; kunordigi kaj subteni la kunlaborantajn fakajn asociojn de UEA; kaj modernigi kaj ampleksigi la Delegitan Reton. La Centro povos ankaŭ konsili pri la redaktado de la revuo, pri la eldonprogramo de UEA, pri la modernigo kaj variigo de la kongresoj, kaj aliaj aspektoj de la kulturpolitiko de la Asocio.

3.3.3. *Regionaj komisionoj.* En Azio, Afriko kaj Ameriko, la regionaj komisionoj iom post iom helpis krei komunajn tradiciojn de renkontiĝoj kaj kongresoj, bultenoj kaj revuoj, vojaĝado kaj korespondado. Daŭrigo kaj ampleksigo de tiu agado en ĉiuj mondopartoj (nun ankaŭ ĉe Pacifiko, Mezoriento kaj Eŭropo) postulos plifortigon de la rolo kaj rimedoj de la komisionoj. Ĉe Kunordigo, oni traktos la kunligadon de la komisionoj al la landaj laborgrupoj, kiuj zorgas pri la konkretigo kaj realigo de la UEA-strategio ene de la diversaj landoj. Ĉi tie temas pri disvolvo de la kultura dimensio de tiu agado.

3.3.4. *Subkomitato pri Agadkampo 3.* Pri kunordigita strategio sur la tuta agadkampo respondecos almenaŭ du estraranoj, pluraj komitatanoj en la Konsilio kaj laŭbezone ankaŭ ŝlosilaj aktivuloj el la ĉefaj instancoj (CKE kaj la regionaj komisionoj), sub la nomo “Subkomitato 3: Komunumo”.

### 3.4. Strategiaj prioritatoj sur Agadkampo 3

**Strategia prioritato 3.1.** *Plivastigi kaj disvolvi la uzadon de la servoj de UEA.* Temas ne nur pri pligrandigo de la nombro de uzantoj, sed ankaŭ pri pliprofundigo de la uzanto-sperto. Tiucele:

- plivastigi la Libroservon al plenfunkcia reta vendejo kaj komunumo de uzantoj, kun aldono de recenzoj, komentoj, forumoj k.s.;
- ebligi “virtualan” partoprenon en la Universalaj Kongresoj, provizante tutmondan retan publikon per sonregistraĵoj kaj videoj, novaĵoj, kaj interagaj ebloj dum la kongresa semajno;
- re-orienti la revuon en kombino kun nova retpaĝaro kaj retpoŝtaj bultenoj, por gajni pli da legantoj kaj pli bone speguli la plenan gamon de movadaj agadoj kaj ideoj.

**Strategia prioritato 3.2.** *Fari pli facila, alloga kaj kontentiga la partoprenon en konkretaj kulturaj kaj fakaj agadoj.* Per tia partopreno oni firmigas senton de aparteno al la movado (kaj al UEA) kaj krome pludisvolvas la proprajn lingvajn kapablojn kaj kulturen kleron. Tiucele:

- konsulte kun la delegitoj kaj ĉefdelegitoj, restrukturi la koncepton kaj funkciojn de la Delegita Reto konforme al nuntempaj bezonoj kaj deziroj;
- ellabori sistemojn por subteni la fakajn asociojn, ekzemple sur la kampoj de membrovarbado kaj administrado, kotizado, elektronika komunikado kaj kunlaboro pri fakaj tekstoj kaj terminoj;
- rekoni, subteni, kaj iniciati kulturajn projektojn kun tutmonda partopreno, kiel ekzemple la evoluigo de Vikipedio, Muzaiko, la projekto Vizaĝoj, konkursoj kaj festivaloj de Esperanto-kino kaj -muziko ktp.

**Strategia prioritato 3.3.** *Disvolvi la solidaran helpagadon.* Multaj homoj donacas al la fondaĵoj de UEA, iuj kluboj kaj asocioj entreprenas la proprajn solidaraĵajn agadojn, kaj diversaj individuoj helpas aliajn individuojn, klubojn, projektojn ktp. La kampon eblas multe plifortigi per bona komunikado pri bezonoj, subten-ebloj, rezultoj kaj simile. Tiucele:

- starigi pli detalan, anekdoto-plenan raportadon pri la celoj kaj rezultoj de subvencioj el la fondaĵoj, por kreskigi fidon kaj donacemon inter la UEA-membraro;
- krei retpaĝaron por la fondaĵoj, kiu faciligas komunikadon pri aktualaj bezonoj sur diversaj kampoj kaj elekteblaj celoj por la donacantoj;
- instigi movadanojn kaj movadajn organizojn ĉiunivele al pli aktivaj solidaraĵaj rilatoj kaj agadoj, cele al ĝenerala kreskado de la donacado kaj helpagado.

### 3.5. Tempoplanado laŭ jaroj

3.5.1. En la unua jaro de ĉi tiu laborplano (2013-14), fondiĝos la nova Centro por Kultura Evoluigo, kies unua fokuso (kunlabore kun la Estraro kaj la Centra Oficejo) estos la renovigado de la tradiciaj servoj kaj agadoj de UEA: la revuo, la Libroservo, la kongresoj, la Delegita Reto kaj Jarlibro, la fondaĵoj. Tiu renovigado daŭros en la postaj jaroj, sed la planado kaj unuaj paŝoj okazos en ĉi tiu unua jaro. Laŭeble oni enplektos la regionajn komisionojn en tiun laboron, ekzemple en la rekonceptado de la Delegita Reto por

adekvate respondi al la interesoj, bezonoj kaj ebloj en diversaj landoj, en la raportado pri la fondaĵoj, kaj la programado de la kongresoj.

3.5.2. Jam ĉe Kapabligo oni notis la 60jariĝon, en novembro 2014, de la Unesko-rezolucio de Montevideo, kiu komisiis la Ĝeneralan Direktoron de Unesko “sekvi la kurantan evoluon en la uzado de Esperanto en scienco, edukado kaj kulturo”. Do ankaŭ ĉe Komunumo tio donos okazon por fari bilancon de la ĉefaj atingoj kaj nuntempa uzado de Esperanto sur plej diversaj kulturaj kampoj – kaj kundiskuti pri la plej gravaj evoludirektoj por la Esperanto-kulturo en la venonta jardeko. Tio estos la fokuso de la dua jaro de la laborplano (2014-2015) kaj la ĉeftemo de la UK en 2015. Kiel notite ĉe Konsciigo, tiu jaro (2015) estos ankaŭ okazo por tutmonda debato pri socia evoluo, kaj oni traktos nian komunumon ankaŭ en tiu pli vasta kunteksto. En la jaroj antaŭ kaj post la UK, la regionaj komisionoj zorgos pri esplorado de la sama temaro regionnivele, kaj la diversaj fakaj asocioj estos aktive enplektitaj en la farado de bilancoj kaj planoj.

3.5.3. En la tria jaro (2015-2016), kiam ĉe Konsciigo oni emfazos la temon lingva justeco, kaj ĉe Kapabligo kadre de la Jaro de la Lernanto oni celos maksimume malfermi la movadon al novuloj, ĉe Komunumo temos pri la “interna” flanko de lingva justeco – kiel konstrui movadon (kaj lingvon) kiel eble plej inkluzivan kaj demokratian. Organizaj strukturoj, senperforta komunikado, interkultura konduto, literaturo de socia justeco, la dinamiko inter simpleco kaj riĉeco de la vortprovizo... jen kelkaj el la esplorindaj subtemoj, kiuj povus pliriĉigi la funkciadon kaj memkomprenon de la movado.

3.5.4. Provizore, en la kvara jaro (2016-17) okazos vasta diskutado de la idea bazo de la movado, kun speciala atento al la verkaro de Zamenhof, kies centa mortodatreveno okazos en aprilo 2017, kaj kiel interpreti lin por la nuntempo.

### 3.6. Strategia laborplano de la Centro por Kultura Evoluigo (CKE)

	2013-14	2014-15	2015-16	2016-17
<b>SP1:</b> Revuo <i>Esperanto</i> uea.org Libroservo UK	Renovigo de servoj kunlabore kun la Centra Oficejo	Montevideo 60: Revua temo Kongresa temo Vendokampanjo Libroklubo	Justeco/demokratio: Revua temo Kongresa temo Vendokampanjo Libroklubo	La Esperanta idearo: Revua temo Kongresa temo Vendokampanjo Libroklubo
<b>SP2:</b> Delegita Reto Jarlibro Fakaj asocioj Kulturaj projektoj	Renovigo de tradiciaj formoj de partopreno en UEA: fokuso al la Delegita Reto	Montevideo 60: Fokuso al la fakaj asocioj	Justeco/demokratio: Lanĉo de novaj tutmondaj projektoj kaj kunlaboraj retoj	La Esperanta idearo: Verkado, tradukado, eldonado; reaperigo de klasikaj verkoj
<b>SP3:</b> La fondaĵoj kaj la helpagadoj	Plivastigo de manieroj donaci kaj subteni aliajn movadanojn	Montevideo 60: Regionaj historioj kaj kulturaj kontribuoj	Justeco/demokratio: Kreskigo de fondaĵoj, internaciaj helpagadoj	La Esperanta idearo: Celoj kaj modeloj de esperantista solidareco

3.6.1. La Centro alportos novan dimension al la agado de UEA, en tio ke la respondecado pri ĉi tiuj diversaj facetoj de la movada vivo estis ĉiam dividita inter pluraj estraranoj, la Ĝenerala Direktoro kaj la diversaj fakoj de la Centra Oficejo. Kvankam tiu plureco neeviteble restos, la Centro donos forumon kaj strukturon por pensi strategie pri tiuj agadoj kune – pri la kontribuoj de UEA al la evoluo de la Esperanto-komunumo – kaj por fari decidojn kaj rekomendojn kun atento al tiu pli vasta kunteksto. Krome, ĝi donos

kadron por efektiva kunlaboro, kiu ĝis nun mankis – ekzemple pri la programado de la kongresoj, aŭ pri la funkciado kaj enhavo de uea.org. La amplekso kaj aktiveco de la Centro povos kreski iom post iom, responde al la engaĝiĝo de diverskampaj aktivuloj kaj ĝia sukceso efektive renovigi kelkajn videblajn aspektojn de la agado de UEA.

3.6.2. Same kiel ĉe la kampo Konsciigo, la elekto de temaj jaroj helpas enfokusigi la agadon de la Centro, kiu alie povus disipi sian energion ĉe tro multaj diversaj projektoj. La bazo de ĉio estas la evoluigo de jam ekzistantaj strukturoj kaj tradicioj, kunlabore kun la Estraro kaj la Centra Oficejo. Ĉar tio rekte tuŝos la taskaron de la dungitoj, ĝi estos realigebla nur post zorgaj diskutoj kaj kunplanado kun la Ĝenerala Direktoro kaj aliaj stabanoj. Tio do estos la fokuso en la unua jaro de la laborplano (2013-2014), kiam en la Centro enplektiĝos nur limigita nombro de aktivuloj kun la bezonataj teknikaj kaj movadaj konoj. Inter la prioritatoj: nova redaktostrategio por la revuo *Esperanto* kadre de pli vasta komunika strategio, nova retejo kun multe pli da interagaj ebloj, novaj manieroj rete partopreni en la UK, novaj funkcioj por la Delegita Reto. En postaj jaroj tiu renovigado daŭros, sed kunlige kun aliaj agadoj de la Centro, kiu ludos gvidan rolon en la disvolvado de la diversaj jaraj temoj.

3.6.3. Ĉe la servoj (SP1), la strategio emfazas vastigon de la klientaro. Krei revuon kun interesa kaj varia enhavo, kiu donas senton pri komunaj direkto kaj energio; krei retejon kun konstanta fluo de novaĵoj, filmetoj kaj bildoj, opinioj kaj anoncoj; krei retan klubon por la klientoj de la Libroservo, per kiu cirkulas recenzoj, diskutoj, intervjuoj kun aŭtoroj kaj simile; krei retan kongresanecon, kiu donas aŭtentan sperton de partopreno en UK. Videble, multaj el tiuj paŝoj dependos, almenaŭ parte, de investoj en la reta evoluigo de UEA. Ĉar tio ne estas pagebla el la Spezokonto, necesos apartigi parton de la kapitalo por tiu celo, eventuale en la formo de nova fondaĵo aŭ rezervo pri kies utiligo konsilas la Centro.

3.6.4. La aktivigo de la membroj (SP2) estos dua prioritato de la Centro. Evidente pli vasta uzo de la servoj estas ankaŭ speco de membro-aktivigo, sed ĉi tie temas pri volontulaj agadoj, kiuj kostas tempon pli ol monon. Unuavice la Delegita Reto, kiu dekomence estis la ĉefa kadro por aktiva membreco en UEA, bezonas modernigon – denove en ligo kun retaj rimedoj por doni informojn, fari kontaktojn, kaj aranĝi vizitojn kaj aliajn servojn. Tion oni devas entrepreni kunlabore kun la ĉefdelegitoj ĉiulande, do ne eblas antaŭdiri, ĝuste kiaj solvoj montriĝos plej taŭgaj. Iom simila situacio ekzistas ĉe la fakaj asocioj. Necesas unue konstati, kiuj havas la plej grandan kresko-potencialon kaj signifon por la tutmonda Esperanto-komunumo; kunlabore kun tiuj, la Centro povos evoluigi komunajn rimedojn kiuj verŝajne utilos al ĉiuj aliaj. Povus temi ekzemple pri komuna aliĝ- kaj kotiz-sistemo, komunaj informpaĝoj kadre de uea.org, kunlaboro pri kongresaj aranĝoj kaj seminario, kaj simile. Per la landaj kaj regionaj asocioj, inkluzive de la TEJO-sekcioj, oni povos ankaŭ vaste varbi por allogi novajn membrojn al la plej funkcipovaj fakaj asocioj. Laste, ekzistas grandaj komunaj projektoj sen formala organizo, kiel Vikipedio aŭ Muzaiko: la Centro serĉos manierojn rekoni kaj subteni tiajn projektojn, kaj ankaŭ mem iniciati ilin, kiam okazo prezentiĝos.

3.6.5. Pri la kultivado de movada solidareco kaj helpagadoj (SP3), la Centro havos ĉefe kunordigan kaj idean rolon. UEA efektive funkcias kiel speco de evoluhelpa organizo por movadanoj en pli malriĉaj landoj, kaj ankaŭ foje kiel peranto de kriza helpo en okazo de katastrofoj. La Centro devos trovi novajn manierojn komuniki tiujn agadojn al la



membroj kaj doni al ili pli da ebloj kontribui, ĉu per mono, ĉu per materiaj aŭ teknikaj rimedoj, ĉu per morala subteno (ekzemple vojaĝante, korespondante ktp), ĉu per volontula agado. En tio la Centro devos proksime kunlabori kun la regionaj komisionoj kaj la Ĝenerala Direktoro. Baza neceso estas pli bona komunikado pri la bezonoj kaj rezultoj de diversaj formoj de helpo; ekzemple, per retpaĝoj kiuj montras fotojn kaj rakontojn de esperantistoj kiuj profitis de tia helpo, kaj per jara raporto kiu faras inspiran resumon de la tuta agado. La Centro povas ankaŭ helpi evoluigi la movadan pensadon pri la rilatoj nordo-sudo kaj la etiko kaj efiko de diversaj formoj de helpagado.

3.6.6. Pli detala strategia laborplano de la Centro por Kultura Evoluigo estos la tasko de ĝia unua estraro kunlabore kun Subkomitato 3: Komunumo.

### 3.7. Strategiaj laborplanoj de la regionaj komisionoj

	2013-14	2014-15	2015-16	2016-17
SP1	Kunlaboro pri la revuo kaj nova retpaĝaro de UEA	Regionaj kongresoj kaj konferencoj pri Montevideo 60	Regiona disvastigo de libro- kaj muzik-kluboj	Regionaj kongresoj kaj konferencoj pri la E-idearo
SP2	Renovigo de la Delegita Reto en ĉiu regiono	Aktivigo de la fakaj asocioj en ĉiu regiono	Regiona partopreno en tutmondaj projektoj	Verkado, tradukado, eldonado de regionaj idearaj verkoj
SP3	Novspeca raportado pri la regionaj agadoj kaj fondaĵoj	Bilancio de la regiona agado kunligite kun Montevideo 60	Plivastigo de donacantoj al fondaĵoj, internaciaj helpagadoj	Celoj kaj modeloj de esperantista solidareco

3.7.1. La kreskanta tutmondiĝo de Esperanto estas granda ŝanco kaj granda defio por UEA. Tion ni celas rekoni kaj alfronti per elstarigo de la regionaj komisionoj en la Komunumo-strategio, kompletige al la laboro de la Centro por Kultura Evoluigo. La komisionoj devos reprezenti la grandan kulturan, ekonomian, socian diversecon en la movado, kaj zorgi ke UEA adekvate respondu al tiu diverseco en siaj strukturo, agado, kaj ideoj. Reciproke, kvankam ĉiu regiona komisiono devas elformuli propran strategion responde al la realaj kondiĉoj kaj prioritatoj en tiu mondoparto, ni celas kunligi tiujn regionajn strategiojn al komuna koncepto kaj evoludirekto pri la movado kiel tuto.

3.7.2. La celata efiko de la Komunumo-strategio en la regionoj estas dudirekta. Unuflanke, ĝi celas plivigli la movadan vivon en la regionoj, stimolante la disvolvon de novaj strukturoj, agadoj, tradicioj kiuj profundigas la signifon kaj la plezuron de la uzado de Esperanto en la regiono. Aliflanke, ĝi celas diskonigi la regionajn kulturojn (movadajn kaj ekstermovadajn) ĉe la tutmonda movado, vekante intereson, admiron kaj solidarecon ĉe esperantistoj en aliaj mondopartoj.

3.7.3. Individua membreco en UEA restos grava aspekto de la regiona agado. Tial la renovigo de la servoj al individuaj membroj (SP1) kaj la ebloj volontule kontribui al la Asocio (SP2) estas prioritato ankaŭ el regiona vidpunkto. Ekzemple, la izolitaj esperantistoj en landoj sen forta movado, kiuj ofte membriĝas en UEA per Fondaĵo Canuto, same kiel la anoj de la pli fortaj landaj asocioj, devus trovi en la revuo materialon kiu sentigas ilian partoprenon en la regiona same kiel la tutmonda movado. Per sia delegiteco, la diverslandaj anoj de la Delegita Reto devus sperti pli profundan engaĝon ankaŭ kun la regiona movado. La fakaj asocioj devus havi ankaŭ regionan videblon kaj influon. Per konsiliĝo inter la regionaj komisionoj kaj la Centro por Kultura Evoluigo, oni

serĉos manierojn kreskigi la senton de aparteno kaj la uzadon de Esperanto en plej diversaj mondopartoj kaj kulturaj kuntekstoj. Temos pri longdaŭra evoluo, sed la bazo kreiĝos jam en la unuaj jaroj de la laborplano.

3.7.4. Komunikado kaj informfluo ludas gravan rolon en la rilatoj de UEA kun la regionoj. Tial jam en la unua jaro troviĝas emfazo pri renovigo de la revuo kaj retpaĝaro (SP1) kaj de la prezento de la regionaj agadoj kunlige kun la fondaĵoj (SP3). Iu ajn esperantisto, trafante hazarde la revuon de UEA, ĝian retejon aŭ la Jarlibron, devus povi rapide konstati la grandan regionan diversecon de la movado kaj orientiĝi pri la malsamaj evoluoj en la diversaj mondopartoj. Iu, kiu pripensas donaci al fondaĵo, devus povi facile trovi informriĉan raporton pri la agadoj, kiujn ĝi subtenis en la antaŭa jaro, kaj pri la prioritatoj por novaj donacoj. La regionaj komisionoj ludos kernan rolon en la realigo de tiuj celoj.

3.7.5. La regionaj kongresoj kaj renkontiĝoj, kiuj nun pli-malpli regule okazas en Eŭropo, Azio, Afriko kaj Ameriko, havas grandan strategian gravecon. Kvankam ili nature havas siajn proprajn ecojn, celojn kaj tradiciojn, por UEA estas grave, ke ili ankaŭ respegulu la ĝeneralan strategion. La strategio antaŭvidas ilian kunligon kun la kadraj temoj por jaro 2 (Montevideo 60), 3 (Justeco/solidareco), kaj 4 (la Esperanta idearo) (SP1), kaj ili krome povas efike antaŭenigi la aliajn strategiajn prioritatojn, ekzemple servante kiel regionaj konferencoj de la delegitoj de UEA (SP2), invitante kontribuojn de la fakaj asocioj kun regiona membreco (SP2), kaj informante pri la diversaj servoj de UEA kiel la revuo kaj la Libroservo (SP1). Alkongresa vojaĝhelpo por nepagipovaj regionanoj estas bona celo por en- kaj ekster-regiona solidareco (SP3).

3.7.6. Interplektitaj kun tiuj aliaj agadoj estas la konsumado kaj produktado de kulturaj valoroj. Ĝenerale, UEA volas kreskigi tiun "kulturan ekonomion" de la movado; tio signifas kreskigi la klientaron de la Libroservo en la diversaj regionoj (SP1), instigi homojn ĉiuregione aktive verki, traduki, muziki, filmi, ktp (SP2), kaj proponi al donacemuloj la eblon aĉeti librojn, diskojn kaj simile por kluboj kaj bibliotekoj en aliaj landoj (SP3). La reto ankaŭ disponigas multajn eblojn por senpage partopreni en la Esperanto-kulturo; tion oni devas rekoni kaj disvolvi samtempe, i.a. en la formo de grandaj partoprenigaj projektoj (SP2) aldone al tradicioj kiel la Belartaj Konkursoj. En ĉio ĉi la regionaj komisionoj kaj la Centro por Kultura Evoluigo devos proksime kunlabori.

3.7.7. Pli detalaj strategiaj laborplanoj de la regionaj komisionoj estos la tasko de iliaj anoj kunlabore kun Subkomitato 3: Komunumo.

## Agadkampo 4: Kunordigo

### 4.1. Kunordiga rolo de UEA

4.1.1. *Kunligi ĉiujn esperantistojn kaj ĉiujn landajn kaj regionajn organizojn en unu fortika tutmonda movado.* Kvankam ne plene realigebla, tiu aspiro estas tre evidenta en la historio de UEA kaj respondas al la tradicia aspiro de la esperantistoj, ke la lingvo mem kunigu la homaron. La tre diversflanka strukturo kaj agado de UEA, inkluzive de ĝiaj plej malnovaj kaj plej praktikaj servoj, atestas tiujn ambiciojn.

4.1.2. *Disvastigi la lingvon en novaj landoj kaj sur novaj uzkampoj, kaj gajni rekonon por ĝi ĉe la ŝtatoj, la interŝtataj organizoj kaj ĉe diversaj neregistaraj organizoj.* UEA provas mobilizi la fortojn de la lingvo kaj movado por fari ilin pli tutmondaj, pli inkluzivaj, pli ĉiokovraj, kaj pli amasaj. Ĝenerale, tiu disvastiga strebado devis kunvivi aŭ eĉ konkurenci kun alia, pli enfermita okupiĝo pri la tradicioj kaj bezonoj de la ĝisnuna movado (komunumo).

4.1.3. *Evoluigi ideojn, rimedojn kaj agmetodojn.* UEA principe provas doni idean direkton kaj koheron al la disaj klopodoj de la esperantistoj disvastigi kaj utiligi sian lingvon. En tiu rolo, simile kiel aliaj internaciaj organizaĵoj, ĝi devas navigi inter diversspecaj novigemaj kaj tradiciemaj tendencoj sine de la asocia kaj individua membraro, kaj respondi al pli vastaj mondaj evoluoj en kulturo, teknologio, politiko k.a. Kiel la plej granda kaj stabila E-asocio, ĝi ankaŭ provas konstrui fortikan financon bazon por subteni la agadon, kaj atingi laŭeble altan nivelon de profesieco kaj efikeco sur la diversaj agadkampoj.

### 4.2. Organizaj rimedoj

4.2.1. *Individua membraro.* Dekomence UEA celis disponigi rimedojn por faciligi “ĉiuspecajn spiritajn kaj materiajn rilatojn” inter siaj membroj, flegante reciprokan respekton kaj solidarecon. Kvankam ĝi daŭre estas la plej granda internacia asocio de kotizpagantaj esperantistoj, la individua membraro – ankoraŭ super 6 000 en la jaro 2007 – malkreskis lastatempe ĝis ĉ. 5 000, kaj la proporcio de membroj sub la aĝo de 30 falis ĝis 7%.

4.2.2. *Landaj asocioj kaj regionaj komisionoj.* La postmilita UEA sekvis la vojon de Unuiĝintaj Nacioj, celante plian universalecon per la reprezentiĝo de laŭeble multaj sendependaj ŝtatoj – ĉi-kaze en la formo de landaj E-asocioj. Tiuj asocioj estas tamen plejparte volontulaj kaj la sistemoj kaj rimedoj por kunlaboro estas limigitaj. En la lastaj tri jardekoj elkreskis sistemo de regionaj komisionoj, kiuj kontribuas al movada kunordigo kaj evoluigo en la koncernaj mondopartoj.

4.2.3 *Fakaj asocioj.* Iom simile kiel UN aŭ Unesko, UEA havas diversgradajn rilatojn kun tuta aro da sendependaj internaciaj asocioj, plejparte malgrandaj. Kelkaj formale aliĝis al UEA kaj rajtas je reprezentado en la Komitato, sed la plimulto havas nur kvazaŭ informan rilaton kun UEA, listiĝante en la Jarlibro kaj sendante al la Biblioteko Hodler siajn eldonaĵojn. Multaj fakaj asocioj apenaŭ plu havas junajn membrojn, kaj kampoj kun

dinamisma progreso, kiel muziko, ĝenerale organiziĝas ekster la tradicia asocia strukuro.

4.2.4. *Komitato kaj Estraro.* La ĉefan kunordigan rolon, almenaŭ laŭstatute, havas la Komitato – konsistanta ĉefe el reprezentantoj de la landaj (kaj kelkaj fakaj) asocioj (Komitatanoj A) kun kelkaj pliaj individuoj, ĉu elektitaj de la membraro (B) aŭ de la aliaj komitatanoj pro siaj specifaj kapabloj (C). La Komitato tamen kunsidas nur unu fojon jare, kunlige kun la UK, kaj malmulte aktivas interkongrese. Pli aktivan rolon ludas la Estraro, grupo de 7-9 homoj elektita de la Komitato por plenumi ĝiajn decidojn kaj por zorgi pri la ĝenerala gvidado de la Asocio.

4.2.5. *Centra Oficejo.* Esencan rolon ludas la profesia stabo de la Asocio sub gvido de la Ĝenerala Direktoro. Inter ĝiaj plej influaj kontribuoj al Kunordigo estas: prespretigo kaj eldonado de la revuo *Esperanto* kaj la Jarlibro, organizado de la Universalaj Kongresoj, administrado de la kontosistemo kaj de la tuta financa flanko de la Asocio, korespondado kun individuoj kaj asocioj tra la tuta mondo, kaj prizorgado de la oficialaj rilatoj de UEA kun diversaj internaciaj instancoj kaj organizoj.

4.2.6. *TEJO.* Tutmonda Esperantista Junulara Organizo estas integra parto de UEA laŭ jura kaj financa vidpunktoj, kvankam en multaj rilatoj ĝi agas pli-malpli sendepende. Ĝia strukturo similas al tiu de UEA, kun inividuaj membroj, landaj sekcioj, komitato kaj estraro. TEJO havas siajn proprajn eldonaĵojn, unuavice *Kontakto*, sian propran kongreson kaj siajn proprajn rilatojn kun diversaj organizoj. Ĉar la agado de TEJO tuŝas ĉiujn gravajn aspektojn de la strategio de UEA, necesas multe pli funda dialogo inter ĝia estraro kaj tiu de UEA pri prioritatoj, rimedoj, kaj strukturaj demandoj. Starigi tian dialogon devas esti urĝa prioritato por la unuaj monatoj de ĉi tiu Plano.

4.2.7. *Komisionoj kaj instancoj.* Kadre de UEA ekzistas diversaj strukturoj, kiuj agas kvazaŭ nome de UEA sed funkcias kun relative granda aŭtonomeco. Tiuj inkluzivas la Centron por Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvo-Problemoj (CED), la Terminologian Esperanto-Centron (TEC) k.a. Iom simile funkcias diversaj komisionoj nomitaj de la Estraro aŭ de la Komitato, interalie tiu por la Belartaj Konkursoj.

### 4.3. Strategiaj prioritatoj sur Agadkampo 4

**Strategia prioritato 4.1.** *Evoluigi pli aktivan kaj koheran organizan kernon.* La ĝisnuna sistemo Estraro-Komitato-Centra Oficejo malbone funkcias diversrilate. Necesas krei pli grandan kernan teamon kiu laboras sub komuna strategio, komunikas intense kaj efike inter si, kaj interkonsile prizorgas la ĉefajn agadkampojn. Tiucele:

- ellabori strategian laborplanon sufiĉe detalan, ke ĝi kapablas vere gvidi strategiajn elektojn kaj la disponigon de rimedoj sur ĉiuj ĉefaj agadkampoj;
- tenante la Estraron malgranda, krei novan grupon de aktivuloj ĉirkaŭ ĝi kiuj konstante partoprenas en la farado kaj plenumado de decidoj kaj la gvidado de la Asocio inter la kongresoj;
- enkonduki sistemon de perreta informfluo, diskutado kaj voĉdonado kiu funkcias rapide, efike kaj konstante por pli granda aktivularo ol nur kelkkapa Estraro;

- krei pozitivan etoson kaj sistemon de reciproka informado kaj konsultado inter la volontulaj aktivuloj kaj la stabo de la Centra Oficejo (kune kun ev. aliaj pagataj kunlaborantoj);
- plibonigi komunikadon pri decidoj kaj agadoj tra la tuta UEA-strukturo, inkluzive de raportado al la ĝenerala membraro.

**Strategia prioritato 4.2.** *Restrukturi kaj plivigli la rilatojn kun la diversaj aliĝintaj kaj kunlaborantaj landaj asocioj.* En la nuna sistemo, aliĝo kaj kunlaboro havas precipe formalan signifon kaj ne estas rekte ligitaj al specifaj formoj de kunagado. Necesas reformi la sistemon por pli bone kombini la fortojn de la diversaj asocioj kaj disvolvi kulturon de kunlaboro kaj kunplanado. Tiucele:

- konsulte kun la landaj estraroj, trovi/krei landan laborgrupon kiu kunigas la ĉefajn enlandajn aktivulojn sur la diversaj agadkampoj de UEA por konkretigi kaj efektivigi ĉi tiun strategian planon land- kaj region-nivele;
- esplori pri la evoluigo de komunaj elektronikaj sistemoj de membro-administrado, kotizado, organizado de renkontiĝoj, informado kaj instruado, komunikado kaj kunlaboro;
- krei pli flekseblajn kaj inkluzivajn organizajn strukturojn kiuj respondas al la reala bunteco kaj translima agado de la Esperanto-movado, evitante troan enfokusiĝon al ŝtataj strukturoj kaj nacieca pensmaniero;
- ligi la landajn asociojn pli firme al la regionaj komisionoj por plifortigi la regionan kunlaboron, eventuale ĝis reformo de la elektoprocezo por la Komitato por doni al la regionaj komisionoj formalan reprezentan rolon.

**Strategia prioritato 4.3.** *Plisaniĝi kaj plivastigi la financojn per kreskigo de rimedoj kaj pliefikigo de servoj.* La kapitalo de UEA multe kreskis en la lastaj tridek jaroj, sed kreskis ankaŭ la kostoj kaj malkreskis la enspezoj (precipe pro ŝrumpo de la membraro). El tio sekvas konstanta premo al la buĝeto kaj manko de rimedoj por novaj iniciatoj. Necesas do provi plibonigi ambaŭ flankojn de la spezokonto – malaltigi la kostojn kaj altigi la rimedojn. Tiucele:

- pliefikigi difinitajn laborojn, surbaze de detala analizo de la praktikaj bezonoj kaj la administraj kaj juraj postuloj, per plia utiligo de nuntempaj teknikaj ebloj (tio postulos investon de kapitalo en la komenco);
- reformi la kotizosistemon kaj la servojn (ekz. revuon, jarlibron, kongreson) por fari pli alloga la membrecon en diversaj kategorioj, cele al pli amasa membraro kun malpli altaj po-kapaj kostoj;
- ĝenerale pli vaste reklami la agadon de UEA kaj pli aktive kaj sisteme varbi membrojn, inkluzive de komencantoj kaj progresantoj kiuj lernis per la reto;
- pliintensigi kaj pliprofesiigi la varbadon de donacoj de ĉiuj specoj: unufojaj, konstantaj (ĉiumonataj), sponsoradoj, testamentoj k.s.;
- sur zorge elektitaj kampoj, evoluigi daŭropovan sistemon de subvencipetado por financi novajn agadojn.

## 4.4. Organiza evoluigo

4.4.1. *Estraro.* La tradicia divido de taskoj en la Estraro, tiel ke ĉiu estrarano respondecas sola pri difinita laborkampo, subfosas la senton de komuna respondeco kaj lasas tro da aferoj al la disponebleco kaj kapablo de unuopuloj. Aliflanke oni devas ankaŭ limigi la

devojn de unuopaj estraranoj, aŭ la taskaro fariĝos ankoraŭ malpli eltenebla por normala homo. Certgrade, ĉiu Estraro devas trovi sian propran solvon al tiu dilemo, sed baza principo estas tio, ke oni havu *teamojn* sur ĉiuj gravaj laborkampoj, kaj la teamo kiel tuto portu la respondecon pri tiu kampo antaŭ la Komitato kaj la membroj. Krom almenaŭ po du estraranoj, ĉiu teamo inkluzivus anojn de la Konsilio (vidu sube). Ekzemploj de teamaj laborkampoj estas financo kaj administrado, eksteraj rilatoj plus esploro kaj dokumentado, kaj landa kaj regiona agado (sur la agadkampoj Konsciigo, Kapabligo, Komunumo).

4.4.2. *Konsilio*. Eĉ se la estrara subteamo pri landa kaj regiona agado enhavus anojn ekzemple el Ameriko, Azio kaj Eŭropo, la tri ĉefaj regionoj de la membraro de UEA, ĝi ankoraŭ ne adekvate reprezentus la tutan diversecon de la landoj kaj regionoj. Simile, eĉ se la estrara subteamo pri administrado kaj internacia agado enhavus anojn kun spertoj kaj scioj pri ekzemple eksteraj rilatoj, kultura agado kaj financo, ĝi ankoraŭ ne kovrus ĉiujn gravajn terenojn de la agado. Tiuj estas nur du ilustraĵoj de la fakto, ke kelkkapa estraro bezonos multajn konstantajn kunlaborantojn por adekvate alfronti sian taskaron kaj zorgi pri plenumo de decidoj. Al tio respondas la propono krei novan strukturon, provizore nomitan la Konsilio, kies anoj partoprenas en la diskutado kaj decidado inter la kongresoj. La Konsilio, eventuale ĉ. 15-kapa, funkcius esence kiel komisiono de la Komitato, kaj ĝiaj anoj estus elektitaj en la sama kongreso kiel la estraranoj laŭ kriterioj de laborpreteco, pruvita kapablo konstrue kunlabori, specifaj konoj fakaj aŭ kulturaj, ktp. Kvankam la Estraro retenus sian statutan decidrajton pri ĉiuj demandoj, la subteno de la Konsilio donus pli da pezo al tiuj decidoj kaj pli da homaj rimedoj por ilia efektivigo.

4.4.3. *Reta diskutado kaj voĉdonado*. Por ebligi vere efikan kaj sencohavan partoprenon de tiom da homoj en la decidoprocezo inter la kongresoj, necesas starigi modernan retan sistemon de proponado, diskutado kaj voĉdonado. La Estraro, estante malgranda, jam senprobleme diskutas kaj voĉdonas per simpla retpoŝto; ĝi povus ankaŭ kunsidi telefone aŭ videokonferente. Sed aliaj solvoj necesas por dudekopo da homoj, kiel en komuna retkunsido de la Estraro kaj Konsilio, kie necesas pridiskuti diversajn temojn kaj proponojn en limigita tempodaŭro. Investo en tia sistemo tial estus nepre prioritato por la funkciigo de tiu pli granda aktivularo. Post elprovado dum la unua jaro, ĝi estus aplikebla ankaŭ por la interkongresa funkciado de la Komitato.

4.4.4. *Komunikado kaj raportado*. Tradicie, la Ĝenerala Sekretario zorgas pri la kontaktoj inter la Estraro kaj Komitato, kaj ankaŭ pri raportoj al la ĝenerala membraro (krom la estrara jarraporto, kiu estas kolektiva verko). En la nuna epoko, kiam multaj homoj alkiutimiĝis al rapida fluo de informoj el multaj fontoj, necesas repripensi la komunikandinforman politikon de UEA. Ekzemple, povus esti utile krei subgrupon de la Konsilio sub la gvido de la Ĝenerala Sekretario, kiu okupiĝas precipe pri la komunikaj rilatoj de UEA kun la movado ĝenerale (salutoj al landaj kaj fakaj kongresoj, gazetaraj komunikoj, retpaĝoj, bultenoj pri la decidoj de la Estraro kaj Konsilio, ktp). La utiligo de videoj, podkasto kaj similaj aŭdvidaj rimedoj estas esplorinda evolutereno, kune kun kompleta refaro de la retpaĝoj ĉe uea.org kaj ellaboro de UEA-strategio ĉe Facebook kaj aliaj sociaj retejoj. Repripensado de la rolo kaj enhavo de la revuo *Esperanto* kaj la Jarlibro devus inkluziviĝi en tiu pli vasta komunika politiko.

## 4.5. Landa kaj regiona evoluigo

4.5.1. *Landaj laborgrupoj.* La komitatanoj A principe reprezentas la interesojn de la landaj asocioj ĉe UEA, konsulte kun ties estraroj. Tamen en la agado de UEA povas enplektiĝi multaj aliaj homoj en difinita lando, kiel delegitoj, ILEI-anoj, aktivuloj de Lernu aŭ Vikipedio k.s., kiuj ne nepre vidas sin aktivi en la kadro de la landa asocio. Por ke la landnivela strategio (pri Konsciigo, Kapabligo, Komunumo) estu vere inkluziva, necesas kunlaboro inter tiuj diversaj elementoj. Tio estus la tasko de la landa laborgrupo, kiu en plej bona kazo povus identi kun la estraro kun la landa asocio, sed kiu ofte devus enplekti aliajn, kiel la ĉefdelegiton, gvidantojn de la landaj ILEI- kaj TEJO-sekcioj ktp. Tiu grupo portus kolektivajn respondecon pri la realigo de la strategia laborplano de UEA ene de la landaj limoj, kaj por zorgi pri bona fluo de informoj kaj ideoj inter la landa asocio kaj la aliaj partoj de la UEA-strukturo – unuavice la regiona komisiono (vidu sube).

4.5.2. *Celoj, planado, raportado.* Kunlige kun la starigado de tiuj landaj laborgrupoj, necesas ankaŭ difini konkretajn celojn sur la ĉefaj agadkampoj por la koncernaj landoj. Same kiel en ĉi tiu laborplano, tio povus inkluzivi pli ĝeneralajn celojn por la daŭro de pluraj jaroj, kaj specifajn planojn por ekzemple trijara periodo. En tiu plana laboro, necesos konsulti aktivulojn diverskampe kaj diversnivele – ekzemple, se temas pri Kapabligo, necesas konsideri almenaŭ la spertojn kaj celojn de la landaj sekcioj de TEJO kaj ILEI, la retan instruadon ĉe lernu.net kaj la rolon de la regiona komisiono en la kapabla laboro. La celataj planoj estu vere inkluzivaj, ne en la senco, ke la laborgrupo devu ĉion mem regi, sed ke ĝi provu sekvi kaj stimuli la efektivan evoluon de la landa movado kiel tuto. Internaci-nivele, ĝi devus raporti ĉiujare pri la faritaj agadoj kaj atingoj, kaj kundiskuti la planojn kaj rezultojn kadre de regionaj kaj tutmondaj strategiaj kunvenoj.

4.5.3. *Utiligo de komunaj teknikaj rimedoj.* La landaj kaj lokaj Esperanto-asocioj estas kutime malgrandaj, kaj ofte luktas kun teknikaj kaj financaj limigoj. Unu esplorinda vojo al progreso konsistus en la evoluigo de komunaj elektronikaj sistemoj de membro-administrado, kotizado, organizado de renkontiĝoj, informado kaj instruado, komunikado kaj kunlaboro. UEA estas en unika pozicio por ellabori tian sistemon, eventuale unue en prova fazo kun nur kelkaj landaj asocioj, antaŭ ol malfermi ĝin al pli da landoj kaj lingvoj. Tiaj ebloj, celantaj faciligon de translima kunlaboro kaj la ŝparadon de administraj rimedoj, devas esti konsiderataj kadre de la ĝenerala renovigo de la retpaĝoj kaj reta strategio de la Asocio.

4.5.4 *Pli flekseblaj kaj celkonformaj strukturoj.* La grupigo de landaj asocioj en unu tegmenta internacia organizaĵo estas malnova modelo de tutmonda agado, kiu certgrade respondas al la reala signifo de ŝtataj strukturoj kaj naciaj identecoj en la moderna mondo. Tamen, unu forto de la Esperanto-movado estas ĝia kapablo entrepreni agadojn kiuj tute ne rilatas al la ŝtata sistemo – kiel ekzemple la ĝemelado de lokaj grupoj en diversaj kontinentoj, aŭ la organizado de translimaj renkontiĝoj por homoj kiuj loĝas en regionoj dividitaj inter du aŭ pluraj ŝtatoj, aŭ la funkciigo de “kulturcentro” kun internacia klientaro. UEA devas eltrovi manierojn konstrue kunlabori kun tiaj homoj kaj grupoj, kies ideoj kaj celoj ne facile enkadriĝas en “nacia” aŭ “ŝtata” kadro sed kongruas kun la ideo kaj celaro de UEA kiel tuto. Tia kunlaboro estu klare

difinita kaj celkonscia – principoj aplikendaj ankaŭ al la malnova kaj apenaŭ efika sistemo de kunlaborantaj fakaj asocioj.

4.5.5. *Plifortigo de regiona kunlaboro.* En la lastaj dudek jaroj iom post iom kreskis la graveco de la komisionoj pri Azio, Afriko kaj Ameriko, kiuj hodiaŭ ludas signifan rolon en la subtenado de malfortaj landaj movadoj, la organizado de regionaj kongresoj kaj la stimulado de kunlaboro inter landaj asocioj. Aldoniĝis komisionoj pri Pacifiko kaj Mezoriento, kaj en 2012 kreiĝis ankaŭ Eŭropa Komisiono por kompletigi la laboron de Eŭropa Esperanto-Unio. Tiuj evoluoj estas tre salutindaj kaj akcelindaj. Ekzemple, la landaj laborgrupoj menciitaj ĉi-supre estus samtempe traktindaj kiel landaj branĉoj de la koncerna regiona komisiono, kaj la raportado kaj kunplanado povus okazi unuavice sur regiona nivelo, kie la aktivuloj pli bone komprenas la kulturan, ekonomian kaj politikan kuntekston de la diverslanda agado. En trijara daŭro, tia evoluanta sistemo de raportado kaj kunplanado devus konduki al la kreo de regionaj strategioj kaj laborplanoj fundamentitaj sur bona kono de la situacio en la diversaj landoj. En pli longa perspektivo, disvolvado de la regiona sistemo povus influi la funkciadon de la Komitato, interalie, kie oni povus imagi pli konscian negocadon inter la vidpunktoj kaj prioritatoj de diversaj mondpartoj, anstataŭ la sendiskuta sekvado de eŭropaj (okcidentaj, nordaj) modeloj. Iam tio povus konkretiĝi en alia strukturo por la Komitato, bazita sur regionaj elektoj.

## 4.6. Financa evoluigo

4.6.1. *Teknika modernigo.* La disvastiĝo de Interreto kaj la evoluo de komputilaj rimedoj por administrado, vendado kaj liverado de servoj profunde ŝanĝis la kondiĉojn por la mastrumado de internacia asocio. Tamen, pro diversaj kialoj, la sistemoj uzataj en UEA (en la CO, la retpaĝoj k.s.) postrestas la ĝeneralan evoluon. Venis tempo por funda reanalizo de la bezonoj kaj ebloj, cele transiron al nova sistem(ar)o kiu maksimume faciligu la kernajn administrajn laborojn kaj metu la bazon por perreta liverado de pli kaj pli da servoj. En tiu analizo, necesas konsideri i.a. la nederlandan leĝaron pri informaj kaj financaj servoj, por vidi kion UEA reale povas proponi al siaj membroj, atentante ankaŭ la sekurecon kaj privatecon de personaj informoj. Por la kreo de tia teknika infrastrukturo, kiu kredeble konsistigos la bazon de la administrado por la venontaj dudek jaroj aŭ pli, necesos utiligi parton de la Asocia Kapitalo – sed tia investo estos nepra por progresi al stato, en kiu UEA kapablos administri membraron kelkoble pli grandan ol la nuna.

4.6.2. *Renovigo de servoj.* Por sia financa sanigo, krom ŝparado de kostoj, UEA povas celi enspezi pli per membrokotizoj. Por tio, ĝi devos allogi kaj teni kreskantan gamon de novaj membroj, aplikante la samajn principojn de merkata analizo kaj reklamado kiuj validas por aliaj asocioj kaj publikoj. Plej grave, la publika bildo de la Asocio devas fariĝi pli moderneca, dinamisma kaj inspira. Tio signifas i.a. ŝanĝi la aspekton kaj enhavon de la revuo kaj Jarlibro, kaj renovigi la retpaĝaron ĉe uea.org por i.a. faciligi la aliron de novaj lernantoj al utilaj (kaj inspiraj) informoj kaj servoj. Preter tiuj prioritataj ŝanĝoj en la sinprezento de UEA, indas pluesplori pri novaj adaptoj kaj plivastigoj de la malnovaj servoj, kiel liverado de informoj al poŝtelefonoj, okazigo de “virtuala” UK paralele kun la tradicia, kaj perado de kulturaj kaj klerigaj spertoj per retaj kursoj, seminarioj kaj simile. Evidente, necesas nur tre zorge enkonduki tiajn plibonigojn aŭ novigojn, ĉar ili devas en



la fino krei sufiĉe da enspezoj por kovri la aldonajn kostojn pro laborfortoj, serviluzado k.s.

4.6.3 *Aktiva membrovarbado.* Paralele kun la renovigo de servoj, necesas pli intense kaj sisteme reklami la agadon de UEA kaj la idealojn, kiuj gvidas ĝin. Interalie, la (relative) amasa perreta lernado de Esperanto kreas novan publikon, kiu apenaŭ scias ion pri la historio aŭ nuntempa agado de la Asocio, sed kiu estas rekte kontaktebla per reklamoj, elektronikaj informiloj, retpoŝto, Facebook kaj simile. Ankaŭ ĉe la bazo de la tradicia movado, multaj homoj ne konscias pri la nuntempa rolo de UEA, kaj tro malofte aŭdas ĝian nomon en ligo kun iu konkreta agado aŭ konvinka ideo. Tial necesas elekti ĉiujare kelkajn kernajn punktojn, kiuj fariĝu la fokuso de aktiva inform- kaj varb-kampanjo celanta allogi kaj teni novajn membrojn en diversaj kategorioj. En tiu kunteksto, indas esplori pri la kreo de komunaj varbkampanjoj kun la landaj asocioj, eventuale eĉ kun la kreo de komunaj membrokategorioj kiuj ebligas al homoj pagi unufoje por membreco en du aŭ pliaj asocioj. Celo de 10%-a jara kresko donus mezurilon por la sukceso de tiaj iniciatoj.

4.6.4. *Varbado de donacoj.* UEA ĉiujare enspezas dekojn da miloj da eŭroj pro donacoj, kaj foje ricevas donacojn aŭ testamentojn de multe pli granda amplekso. Tamen, verŝajne eblas allogi pli da donacoj per pli intensa kaj profesieca varbado. Unue, eblas multe plibonigi la raportadon pri la konkretaj sekvoj de donacoj. Kiel spertis multaj aliaj bonfaraj organizoj tra la mondo, multe pli efikas rakontoj pri specifaj homoj ol ĝeneralaj statistikoj kaj priskriboj, kaj UEA kutime ne raportas detale pri la agado de la fondaĵoj tra kiuj fluas la plej multaj donacoj. Due, eblus disponigi pli da informoj pri la eblaj celoj por difinita donaco, tiel ke donacantoj havu pli klaran imagon pri la utiligo de la mono – faktoro kiu povas esti motiviga por multaj homoj. Trie, UEA povus varbi donacojn pli aktive, ekzemple per ĉiujara kampanjo, per okazaj alvokoj kaj per la flegado de rilatoj kun regulaj donacantoj (kiel okazas certgrade ĉe Societo Zamenhof). Ĉion ĉi indas plibonigi, kunlige kun la renovigo de la retpaĝoj de UEA kaj la refaro de la revuo kaj jarlibro, kaj la adopto de pli aktiva varbpolitiko. Same kiel ĉe la membrovarbado, eblas starigi konkretajn celojn por la kreskigo de donacoj en difinitaj kategorioj, kun aldono de novaj ebloj kiel konstantaj (ĉiumonataj) donacadoj al difinitaj fondaĵoj. Tiajn evoluojn gvidu aparta strategia plano pri membro- kaj donac-varbado, ellaborita kun la helpo de fakuloj pri tiuj kampoj.

4.6.5. *Subvencipetado.* En la lastaj jaroj okazis multaj diskutoj pri la eblo peti subvenciojn por difinitaj projektoj, precipe en la kunteksto de Eŭropa Unio, kie pluraj E-asocioj sukcesis ricevi monon por edukaj kaj kulturaj agadoj. Principe, tiu estas vojo sekvinda ankaŭ por UEA. Abundas eblaj plurlandaj iniciatoj sur la ĉefaj agadkampoj de la Asocio, kiuj povus enkadriĝi en la programoj de EU. Sed tiaj agadoj devas trovi lokon en la ĝenerala strategia evoluo; t.e. ili havu siajn radikojn ĉe la landaj laborgrupoj kaj regionaj komisionoj, aŭ eventuale ĉe aliaj grupiĝoj kiel kulturcentroj kaj fakaj asocioj, por eviti ke la organiza ŝarĝo falu sur la Centran Oficejon. Estas certe imageble, ke post iom da tempo en la Oficejo deĵoros sperta verkanto de tiaj subvencipetoj, kiu kunlaboros kun diversaj grupoj por trovi monon por konkretaj projektoj. Tio tamen estos praktike ebla nur kiam ekkreskos kaj ekdisvastiĝos kulturo de reala kunlaboro kaj komuna planado – do, kiam “UEA” ne nur signifas aŭtomate la centrajn organojn kaj instituciojn, sed ankaŭ kreskantan reton de bone informitaj, trejnitaj, celkonsciaj volontuloj kiuj agas diversloke sub ĝia ŝildo. Evidente, tian evoluon povus krome akceli sukcesa subvencipetado, kiu do

portempe devos okazi kun la helpo de profesiaj konsilantoj aŭ talentaj volontuloj. Tio signifas, ke ĝia loko en la kunordiga strukturo estos provizore ĉe la Fondaĵo por Klerigo kaj Kapabligo.

#### 4.7. Tempoplanado laŭ jaroj

4.7.1. La unua jaro de ĉi tiu laborplano (2013-14) metos bazon por longdaŭra organiza evoluo. Inter la prioritatoj sur la kampo Kunordigo por tiu jaro estas jenaj paŝoj:

- intensa diskonigo de la esenco de la nuna Strategia Plano (kaj la vizio malantaŭ ĝi) ĉe ĉiuj aliĝintaj kaj kunlaborantaj asocioj kaj inter la aktiva esperantistaro ĝenerale;
- funkciigo de la Konsilio (§4.4.2) kiel speco de help- aŭ vic-estraro, kun samtempa elprovo de sistemo de reta diskutado kaj voĉdonado por ĝi (§4.4.3);
- refaro de la retejo uea.org (§4.4.4 kaj §4.6.2) kunlige kun nova komunika, serva kaj varba strategio de UEA;
- starigo de landaj laborgrupoj en la ĉefaj landoj de la membraro de UEA (§4.5.1), kaj evoluigo de landa kaj regiona kunplanado (§4.5.2 kaj §4.5.5);
- disvolvo de programo de aktivula trejnado por helpi tiujn laborgrupojn kaj la Konsilion funkcii efike kaj internaciskale;
- ellaboro de plano por renovigo de la teknika sistemo de la Centra Oficejo (§4.6.1);
- renovigo de la aspekto kaj enhavo de la revuo *Esperanto* kaj la Jarlibro (§4.6.2);
- kreo kaj ekrealigo de strategia plano pri membro- kaj donac-varbado (§4.6.3 kaj §4.6.4).

Ĝis la fino de la jaro 2014, tiuj diversaj evoluoj celus plialtigi la membronombron je 10% (ĝis pli ol 5500), kaj multe kreskigi la nombron de aktivuloj rekte engaĝitaj en agadoj sub la ŝildo de UEA.

4.7.2. En la dua jaro de ĉi tiu laborplano (2014-15), la emfazoj estos jenaj:

- ĉe la Oficejo okazos la teknika renovigo, inkluzive de la starigo de novaj retaj servoj por la membraro (ekz. sistemo de personaj kontoj por transpagado, kotizado, abonado kaj aĉetado);
- la sistemon de reta diskutado kaj voĉdonado oni ekuzos ankaŭ por la Komitato, tiel ke ĝi kontribuu al la asociaj laboroj tra la tuta jaro;
- plivastiĝos la landa kaj regiona agado, por kovri pli da landoj, pli da agadkampoj, kaj pli da konkretaj projektoj kaj subvencipetoj;
- pludisvolviĝos la varb-strategio, kun la celo atingi 6 100 membrojn antaŭ la jarfino kaj ankaŭ kreskigi la donacojn je pli ol 10%.

4.7.3. La tria jaro de ĉi tiu laborplano (2015-16) kondukos al la elektoj de novaj Komitato kaj Estraro en la mezo de 2016. La ĉefa fokuso de la jaro estos do organiza kaj strategia renovigo. Sendube diversaj aspektoj de la nuna strategio montriĝos neadekvataj, dum aliaj sukcesaj paŝoj malfermos novajn perspektivojn. La tempo estos matura por pli vasta diskuto pri la strukturo kaj agado de la Asocio, kiam eblus konsideri ankaŭ reformojn de la Statuto. Se efektiviĝos la ĉefaj punktoj sur ĉi tiu kaj la aliaj agadkampoj, ekzistos jam pli forta kaj sana bazo – idea, homa, teknika kaj financa – sur kiu plukonstrui.

## Apendico: Strategiaj Prioritatoj de UEA, 2013-17

**Strategia prioritato 1.1.** *Modernigi kaj kompletigi la publikan bildon pri Esperanto.* Atingi, ke Esperanto estu vaste komprenata kiel moderna, vivanta lingvo kun unika historio kaj dinamika kulturo. Tiucele:

- ellabori informilojn kiuj objektivaj kaj konvinke prezentas Esperanton por diversaj celpublikoj, zorgante ke la tekstoj kaj tekstaraĝoj estu facile adapteblaj al diversaj kulturaj, fakaj kaj ideaj kuntekstoj;
- ellabori kaj disvastigi komunajn normojn por la informado, kiuj konsistigas karakterizan “informstilon” de UEA kaj kiujn povas apliki la landaj kaj fakaj asocioj (kaj ankaŭ lokaj grupoj k.s.) en siaj diversaj medioj;
- ellabori klaran profilon de UEA en internaciaj medioj (interregistaraj kaj neregistaraj), kiu evidencigas la ligitecon de lingvaj kaj komunikaj demandoj al aktualaj temoj kaj difinas la kontribuon de UEA sur tiuj kampoj.

**Strategia prioritato 1.2.** *Varbi kaj prizorgi subtenantojn kaj kunagantojn.* Atingi, ke la socia valoro de Esperanto kaj UEA estu vaste rekonata, tiel ke multaj homoj kiuj ne mem uzas Esperanton, tamen morale kaj finance subtenu ĝin aŭ kunlaboru kun Esperanto-organizoj por komunaj celoj. Tiucele:

- kunlige kun la agado de TIR, KER kaj CED, krei datumbazon de simpatiantoj-neesperantistoj, la Tutmonda Amikaro de Esperanto, kaj metodojn por varbi ilin;
- ellabori sistemon (ĉefe retan) por regule sendi al tiuj homoj movadajn novaĵojn, tajlitajn laŭ iliaj intereso kaj geografia situo;
- sistemece doni al tiuj homoj eblojn konkrete esprimi sian apogon, per opinisondoj, subskrib-kolektado, donacvarbado, libroroklamado, invitoj al kursoj kaj eventoj, ktp.;
- alianciĝi kun aliaj neregistaraj organizoj pri specifaj, zorge elektitaj publikaj kampanjoj.

**Strategia prioritato 1.3.** *Varbi, interligi kaj trejni aktivulojn.* Disvolvi mondvastan reton de multaj registritaj kaj lertaj aktivuloj pri informado, eksteraj rilatoj, kaj esploro kaj dokumentado. Tiucele:

- krei unuecan registrosistemon kaj komunikosistemon ĉe esperanto.net, kaj sisteme aligi al ĝi ĉiujn aktivulojn sur la menciitaj kampoj, por interŝanĝi materialojn, informojn, spertojn kaj ideojn;
- kunlabore kun la landaj asocioj, ellabori organizan strukturon por TIR kiu faciligas komunikadon kaj kunlaboron pri informado nacikadre kaj transnacie;
- paralele, evoluigi la organizajn formojn de KER kaj CED por faciligi pli vastan partoprenon de ĉiuj intereso en iliaj informretoj kaj agadoj;
- starigi norman kadron por la trejnado de aktivuloj sur la menciitaj kampoj, kunlabore kun la instancoj de Agadkampo 2: Kapabligo.

**Strategia prioritato 2.1.** *Kursoj kaj ekzamenoj.* Plimultigi la homojn, kiuj sukcese trapasis registritan kurson kaj internacian ekzamenon pri Esperanto, i.a. por pli fidinde pritaksi, kiom la lingvo disvastiĝas ĉiujare. Tiucele:

- plibonigi la raportadon kaj disvastigon de informoj pri kursoj je ĉiuj niveloj, inkluzive de informoj pri la uzataj materialoj, metodoj, celata lingvo-nivelo,

nombro de kursanoj ĉe la komenco kaj fino, ktp, laŭ modelo de la “Kursejo” de edukado.net;

- konsekvence reklami la KER-ekzamenojn (i.a. kiel necesan kvalifikon por ĉiuj gvidaj aktivuloj), kaj ellabori novajn manierojn ekzameniĝi, laŭ modelo de la internacia ekzamentago elprovita de edukado.net en 2012;
- elstarigi kaj detale priskribi sukcesajn modelojn de kursoj kaj ekzamenoj, inkluzive de lernejoj studprogramoj, stimulante ilian imitadon kaj adaptadon en ĉiam pli da lokoj.

**Strategia prioritato 2.2. Trejnado de gvidaj aktivuloj.** Starigi programojn por la trejnado de movadaj organizantoj (de projektoj, renkontiĝoj kaj kongresoj, asocia administrado kaj financo, monvarbado, k.s.), instruistoj, tekstumantoj (prizorgantoj de retpaĝoj, revuoj k.s.), tradukantoj, terminologoj kaj informaktivuloj. Tiucele:

- dokumenti kaj pritaksi la jamajn proponojn pri instruista trejnado (ILEI, UAM, RITE, aliaj) kaj pri trejnado de aktivuloj diversspecaj (de TEJO, diversaj landaj kaj fakaj asocioj);
- esplori la aktualan staton de tia trejnado ekster la movado, ĉerpante el tio ideojn kaj metodojn aplikeblajn en Esperanto-kunteksto, laŭeble per la efektiva trejnado de aktivuloj kiuj reportas siajn novajn sciojn kaj kapablojn en la movadon;
- kunlabore kun la plej spertaj trejnantoj kaj praktikantoj en la koncerna fako, ellabori normojn, priskribojn de la enhavo kaj trejnmecoj, kaj modularan skemon por la organizado de kursoj kaj seminarioj pri tiu fako;
- enkadre de edukado.net, laŭ modelo de ĝia jam funkcia Reta Instruista Trejnado aŭ la fako “Liberaj studoj,” krei kaj reklami virtualajn kursojn kiuj sekvas tiujn ellaboritajn programskemojn;
- stimuli kaj subteni la organizadon de parencaj ĉeestaj kursoj kaj seminarioj diverslande, kaj la disvolviĝon de reto de spertaj trejnantoj kaj organizantoj;
- laŭeble profiti de ekstermovadaj subvencioj por tiuj ĉi specoj de kapabla agado, kaj strebi por ĝia ekstermovada agnosko.

**Strategia prioritato 2.3. Esperanto kiel eduka movado.** Kunlabori kun organizoj je ĉiuj niveloj de la movado por doni al instruado, trejnado kaj tutmondeca edukado pli altan prioritaton en la planado, komunikado kaj agado. Tiucele:

- en la informado, multlingve dokumenti kaj elstarigi la edukajn valorojn de la lingvo kaj ĝia kulturo en instruprogramoj kaj neformala edukado;
- en la eksteraj rilatoj, pli sisteme kaj intense kunlabori kun internaciaj kaj naciaj organizoj kies eduka agado (almenaŭ parte) kongruas kun la celoj de UEA, por reciproka interkonatiĝo, pliriĉiĝo je ideoj kaj metodoj kaj praktika kunagado.
- kadre de la komunumo, plibonigi la komunikadon pri lernado, instruado kaj aliaj priedukaj temoj ĝenerale, per regulaj rubrikoj kaj raportoj en landaj revuoj, retpaĝoj k.s., per prelegoj, kursoj kaj seminarioj enkadre de landaj kaj regionaj renkontiĝoj, kaj per aliaj klerigaj rimedoj kiel filmoj kaj libroj.

**Strategia prioritato 3.1. Plivastigi kaj disvolvi la uzadon de la servoj de UEA.** Temas ne nur pri pligrandigo de la nombroj de uzantoj, sed ankaŭ pri pliprofundigo de la uzanto-sperto. Tiucele:

- plivastigi la Libroservon al plenfunkcia reta vendejo kaj komunumo de uzantoj, kun aldono de recenzoj, komentoj, forumoj k.s.;

- ebligi “virtualan” partoprenon en la Universalaj Kongresoj, prezentante sonregistraĵojn kaj videojn, novaĵojn, kaj interagajn eblojn dum la kongresa semajno por tutmonda reta publiko;
- re-orienti la revuon en kombino kun nova retpaĝaro kaj retpoŝtaj bultenoj, por gajni pli da legantoj kaj pli bone speguli la plenan gamon de movadaj agadoj kaj ideoj.

**Strategia prioritato 3.2.** *Fari pli facila, alloga kaj kontentiga la partoprenon en konkretaj kulturaj kaj fakaj agadoj.* Per tia partopreno oni firmigas senton de aparteno al la movado (kaj al UEA), kaj krome pludisvolvas la proprajn lingvajn kapablojn kaj kulturen kleron. Tiucele:

- konsulte kun la delegitoj kaj ĉefdelegitoj, restrukturi la koncepton kaj funkciojn de la Delegita Reto konforme al nuntempaj bezonoj kaj deziroj;
- ellabori sistemojn por subteni la fakajn asociojn, ekzemple sur la kampoj de membrovarbado kaj administrado, kotizado, elektronika komunikado, kaj kunlaboro pri fakaj tekstoj kaj terminoj;
- rekoni, subteni kaj iniciati kulturajn projektojn kun tutmonda partopreno, kiel ekzemple la evoluigo de Vikipedio, Muzaiko, la projekto Vizaĝoj, konkursoj kaj festivaloj de Esperanto-kino kaj -muziko.

**Strategia prioritato 3.3.** *Disvolvi la solidaran helpagadon.* Multaj homoj donacas al la fondaĵoj de UEA, iuj kluboj kaj asocioj entreprenas la proprajn solidaran agadojn, kaj diversaj individuoj helpas aliajn individuojn, klubojn, projektojn ktp. La kampon eblas multe plifortigi per bona komunikado pri bezonoj, subten-ebloj, rezultoj kaj simile. Tiucele:

- starigi pli detalan, anekdoto-plenan raportadon pri la celoj kaj rezultoj de subvencioj el la fondaĵoj, por kreskigi fidon kaj donacemon inter la UEA-membraro;
- krei retpaĝaron por la fondaĵoj, kiu faciligu komunikadon pri aktualaj bezonoj sur diversaj kampoj kaj elekteblaj celoj por la donacantoj;
- instigi movadanojn kaj movadajn organizojn ĉiunivele al pli aktivaj solidaraj rilatoj kaj agadoj, cele al ĝenerala kreskado de la donacado kaj helpagado.

**Strategia prioritato 4.1.** *Evoluigi pli aktivan kaj koheran organizan kernon.* La ĝisnuna sistemo Estraro-Komitato-Centra Oficejo malbone funkcias diversrilate. Necesas krei pli grandan kernan teamon kiu laboru sub komuna strategio, komuniku intense kaj efike inter si, kaj interkonsile prizorgu la ĉefajn agadkampojn. Tiucele:

- ellabori strategian laborplanon sufiĉe detalan, ke ĝi kapablu vere gvidi strategiajn elektojn kaj la disponigon de rimedoj sur ĉiuj ĉefaj agadkampoj;
- tenante la Estraron malgranda, krei novan grupon de aktivuloj ĉirkaŭ ĝi kiuj konstante partoprenu en la farado kaj plenumado de decidoj kaj la gvidado de la Asocio inter la kongresoj;
- enkonduki sistemon de perreta informfluo, diskutado kaj voĉdonado kiu funkcii rapide, efike, kaj konstante por pli granda aktivularo ol nur kelkkapa Estraro;
- krei pozitivan etoson kaj sistemon de reciproka informado kaj konsultado inter la volontulaj aktivuloj kaj la stabo de la Centra Oficejo (kune kun ev. aliaj pagataj kunlaborantoj);

- plibonigi komunikadon pri decidoj kaj agadoj tra la tuta UEA-strukturo, inkluzive de raportado al la ĝenerala membraro.

**Strategia prioritato 4.2.** *Restrukturi kaj plivigli la rilatojn kun la diversaj aliĝintaj kaj kunlaborantaj landaj asocioj.* En la nuna sistemo, aliĝo kaj kunlaboro havas precipe formalan signifon kaj ne estas rekte ligitaj al specifaj formoj de kunagado. Necesas reformi la sistemon por pli bone kombini la fortojn de la diversaj asocioj kaj disvolvi kulturon de kunlaboro kaj kunplanado. Tiucele:

- konsulte kun la landaj estraroj, trovi/krei landan laborgrupon kiu kunigu la ĉefajn enlandajn aktivulojn sur la diversaj agadkampoj de UEA por konkretigi kaj efektivigi ĉi tiun strategian planon land- kaj region-nivele;
- esplori pri la evoluigo de komunaj elektronikaj sistemoj de membro-administrado, kotizado, organizado de renkontiĝoj, informado kaj instruado, komunikado kaj kunlaboro;
- krei pli flekseblajn kaj inkluzivajn organizajn strukturojn kiuj respondu al la reala bunteco kaj translima agado de la Esperanto-movado, evitante troan fokusiĝon al ŝtataj strukturoj kaj nacieca pensmaniero;
- ligi la landajn asociojn pli firme al la regionaj komisionoj por plifortigi la regionan kunlaboron, eventuale ĝis reformo de la elektoprocezo por la Komitato por doni al la regionaj komisionoj formalan reprezentan rolon.

**Strategia prioritato 4.3.** *Plisaniĝi kaj plivastigi la financojn per kreskigo de rimedoj kaj pliefikigo de servoj.* La kapitalo de UEA multe kreskis en la lastaj tridek jaroj, sed kreskis ankaŭ la kostoj kaj malkreskis la enspezoj (precipe pro ŝrumpo de la membraro). El tio sekvas konstanta premo al la buĝeto kaj manko de rimedoj por novaj iniciatoj. Necesas do provi plibonigi ambaŭ flankojn de la spezokonto – malaltigi la kostojn kaj altigi la rimedojn. Tiucele:

- pliefikigi difinitajn laborojn, surbaze de detala analizo de la praktikaj bezonoj kaj la administraj kaj juraj postuloj, per plia utiligo de nuntempaj teknikaj ebloj (tio postulos investon de kapitalo en la komenco);
- reformi la kotizosistemon kaj la servojn (ekz. revuon, jarlibron, kongreson) por fari pli alloga la membrecon en diversaj kategorioj, cele al pli amasa membraro kun malpli altaj po-kapaj kostoj;
- ĝenerale pli vaste reklami la agadon de UEA kaj pli aktive kaj sisteme varbi membrojn, inkluzive de komencantoj kaj progresantoj kiuj lernis per la reto;
- pliintensigi kaj pliprofesiigi la varbadon de donacoj de ĉiuj specoj: unufojaj, konstantaj (ĉiumonataj), sponsoradoj, testamentoj k.s.;
- sur zorge elektitaj kampoj, evoluigi daŭripovan sistemon de subvencipetado por financi novajn agadojn.